



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Julio 2019 n-ro: 43



## *Merhaba,*

Temmuz ayı sonu Uluslararası Esperanto Kongresinin yapıldığı zamandır. Kongre bu sene Finlandiyanın Lahti şehrinde gerçekleşiyor.

Bu ayki dergimizde birbirinden ilginç yazılar var. Mesela:

-- Tempo Sigelita köşesinde ünlü film Moby Dick'e bir bakış var.

-- Arnavutluk'tan Adil Olluri'nin hikayesi çok güzel.

-- Bulgaristan Razgrad Esperantistlerin düzenlediği EKRA 2019 edebiyat yarışması sonuçları ve ödül alan yazılardan bazılarını bu ve sonraki sayılarda yayınlayacağız.

- Necati Cumali'nın Makedonya 1900 adlı kitabından "Uçak" adlı hikaye çevirisi.

ve daha bir çok güzel yazı.

***Hepinize iyi okumalar !***

## *Saluton,*

La fino de julio estas la tempo por la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉijare la kongreso okazas en urbo Lahti de Finnlando.

En ĉi tiu numero de nia revueto estas interesaj artikoloj. Ekzemple:

-- En la rubriko Tempo Sigelita estas interesa vidpunkto pri la filmo Moby Dick

-- La rakonto de Adil Olluri el Albanio estas tre bela


-- Estas la rezulto de EKRA 2019 literatura konkurso organizita de esperantistoj en Razgrad urbo, Bulgario kaj ekde ĉi tiu numero ni publikigos kelkajn konkursaĵojn.

-- La tradukaĵo de la rakonto "Aviadilo" de Neĝati Ĝumali el sia libro Macedonio 1900.

kaj pliaj aliaj belaj artikoloj.

***Bonan legadon al ĉiuj !***

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
UK 2021	2
Esperanto Tago	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ni invitas vin ekkoni kaj uzi gravan rimedon por disvastigi Esperanton	4
EKRA- 2019 en Razgrad, Bulgario por 30-a fojo	5
Lili Dimkova – Portretoj kaj Pejzaĝoj	6
La Hejmlanda Tombejo	6
Tempo Sigelita	7
HERAKLO – HERA – DEJANIRA (ΗΡΑΚΛΗΣ – ΗΡΑ – ΔΗΙΑΝΕΙΡΑ)	8
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	11
Epitafo	12
La du aspektoj de iu kafejo	13
Historioj pri s-ro Kojno (p.3) - Berto Breĥt	13
Ŝercoj	16
Kurcvortenigmo	16
Du hundoj	17
El la libro de "Dao de Jing" (34)	18
Ĉu eksterteruloj ne zorgas homaron?	18
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 14)	19
La dometo de feliĉo - Printempaj Strofoj	20
Forgesemo	20
Stranga Ponto	21
Blogo de vilaĝa kuracisto	21
Finna kuirarto	22
La aviadilo	24
Kio estas nigra truo?	27
Ni komencu ĉie instrui	29
ipi - informilo por interlingvistoj	30
Ni Lernu Esperanton!	31
Muzikanto	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo  
Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul.  
En somero ne okazos aliaj kursoj.

## UK 2021

### UEA kongresos en Belfasto, Nord-Irlando, en 2021

Por la 106-a Universala Kongreso, post du jaroj, la Estraro de UEA elektis la "smeraldan insulon", Irlando, kiel kongreslandon. La Universala Kongreso la unuan fojon okazos en tiu parto de Eŭropo. La gastiga urbo estos Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando. Grava haveno kaj pordo al la belega nord-irlanda marbordo, Belfasto suferis dum la lasta jarcento pro armita politika konflikto, sed nun estas konsiderata kiel unu el la plej sekuraj urboj en la brita insularo.

Fonto: N-ro 806 (2019-06-15)

<https://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2019/UEA-kongresos-en-Belfasto-Nord-Irlando-en-2021>

**ESPERANTO-TAGO**  
**2019**  
26.07.2019

Lernu Esperanton:  
[www.lernu.net](http://www.lernu.net)

Pri lingvoj:  
[www.lingvo.info](http://www.lingvo.info)

Pri interpapola komunikado:  
[www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)  
[www.uea.org](http://www.uea.org)

Justa komunikado  
ankaŭ por indiĝenaj kulturoj!

Esperanto – la internacia lingvo

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La 58-a Esperanto-sumoo okazis de la 12-a ĝis la 26-a de majo 2019. La rezulto jam aperis en nia retejo.

Analizo de la 58-a sumoo:

1. Partoprenantoj: 299 el 35 landoj  
Ŝanĝigo de la nombroj de partoprenantoj:

Septembro 2018 : 336 el 31 landoj  
Novembro 2018 : 331 el 33 landoj  
Januaro 2019 : 302 el 36 landoj  
Marto 2019 : 338 el 35 landoj  
Majo 2019 : 299 el 35 landoj

2. Laŭlandaj nombroj :

Japanio: 73  
Brazilo: 34  
Francio: 32

...

Turkujo: 1

...

3. Perfektaj venkintoj (15 venkoj):  
273 el 298 (91,6%)

4. Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol  
20,000 paĝoj. Averaĝe unu homo  
legas 60 paĝojn dum la 15 tagoj  
de la sumoo.

5. Komentoj:

1. Koreio denove draste falis kaj pro tio la nombro de la partoprenantoj ne superis 300.
2. Ĉi-foje svisaj gelnantoj partoprenis. Svisujo tute dependas de geknaboj.
3. Malaperis partoprenanto el Oceanio.
4. Unu afrikano restas. En Afriko situacio estas malfacila, kaj tio malhelpas la partoprenon en la sumoo.

\*\*\* La 59-a sumoo okazos en septembro. En julio ĝi ne okazos.

## UEA



N-ro 809 (2019-06-20)

**Deklaro de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
okaze de la Monda**

**Tago de Rifuĝintoj, la 20-a de  
junio 2019**

La 20-an de junio ĉiujare, Unuiĝintaj Nacioj markas la Mondan Tagon de Rifuĝintoj. Laŭ la Pakto de UN pri Rifuĝintoj, de 1951, rifuĝinto estas iu, kiu [...]

N-ro 808 (2019-06-19)

**Forpasis Josef Kavka – scienca  
pioniro**

La 15-an de junio 2019 forpasis 97-jara D-ro Josef Kavka, sciencisto, geologo-petrologo, honora membro de ĈEA, UEA kaj ISAE [...]

N-ro 807 (2019-06-18)

**La Azia-Oceania Komisiono de  
UEA renovigis sin**

Konforme al la trijara mandato por ofichavantoj en UEA, la Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM) estas ĵus renomumita de la estraro de UEA. [...]

N-ro 806 (2019-06-15)

**UEA kongresos en Belfasto,  
Nord-Irlando, en 2021**

Por la 106-a Universala Kongreso, post du jaroj, la Estraro de UEA elektis la "smeraldan insulon" [...]

N-ro 805 (2019-06-14)

**Kampanjo por informi pri  
Esperanto en la junulara  
festivalo Polandrock 2019**

UEA petas vian helpon: Helpu nin kolekti 2 000 € por realigi Esperantan agadon en aŭgusto 2019 [...]

## TEJO



**Fotokonkurso  
dum IJK 2019**  
Dum IJK 2019  
Internacia

Junulara Kongreso en Slovakio okazos fotokonkurso kies temo estas Esperanta etoso! Ĉiu rajtas sendi unu foton. La plej belaj fotoj aperos en la ekspozicio kaj tri fotoj ricevos premion en tri kategorioj :  
– 1 premio de la LKK– 1 premio de la urbo– 1 premio de la publiko  
Por partopreni, [...]

**Kontribuu al video por la  
malfermo de IJK 2019 en  
Slovakio!**

Okaze de la 75-a IJK en Liptovský Hrádok (Slovakio), ni invitas vin sendi videojn por krei la bonvenigan filmeton, kiun ni projekcios dum la solena malfermo de la kongreso. En via mallonga video (maksimume 15 sekundoj), vi rapide prezentu vin (diru vian nomon kaj de kiu lando vi venas) kaj diru viajn bonajn dezirojn al [...]

**Komitatkunsido de TEJO dum  
IJK en Slovakio**

La ordinara kunveno de la Komitato de TEJO okazos kadre de IJK (Internacia Junulara Kongreso) 2019 en Liptovský Hrádok, Slovakio. Ankaŭ ĉi foje ni havos tri sesiojn, kiuj okazos la 29-an kaj la 30-an de julio 2019 laŭ la suba temposkemo, ĝis entute 8.5 horoj (kun ebloj starigi petojn por plilongigi la sesiojn). Temposkemo de la komitatkunsido Ŝanĝoj al [...]





## Leteroj de niaj legantoj



Kara samideano!

Mi legas kun tre granda intereso vian revuon kaj mi opinias, ke ĝi estas unu el la plej kvalitaj kaj plej utilaj en la nuntempa

Esperatujo.

**Venelin Mitev** el Bulgario

## Ni invitas vin ekkoni kaj uzi gravan rimedon por disvastigi Esperanton.

<https://esperanto.net/eo/>

estas retejo de UEA, kiu provizas bazajn informojn pri Esperanto, kiel lerni ĝin kaj kiel kontakti landajn, regionajn aŭ lokajn asociojn. Tiuj informoj disponeblas en 66 lingvoj kaj la retejo aŭtomate montras la lingvon de la vizitanto.

### Amikoj de Esperanto

Per la retejo jam aliĝis pli ol 600 Amikoj de Esperanto, kiuj konsistas el homoj, kiuj ĵus konatiĝis kun Esperanto kaj al kiuj ni sendas mesaĝojn por sciigi ilin pri la lingvo, pri UEA, pri TEJO kaj pri la koncerna landa asocio.

Ni sendas la enkondukan dulingvan mesaĝon en Esperanto kaj la angla, araba, farsia, portugala, hispana kaj franca. Tiuj lingvoj reprezentas 87% el ĉiuj aliĝintoj. Se vi volas helpi nin sendi mesaĝojn ankaŭ en via lingvo, bonvolu kontakti nin.

Ni sendos ankaŭ mesaĝojn en Esperanto al eksmembroj de UEA.

### Traduko kaj plibonigo de la tekstoj

La nova versio de la retejo disponeblas en 16 lingvoj. Ni bezonas volontulojn por traduki aŭ plibonigi tradukojn. Ni proponas ne laŭliteran tradukon, sed adaptan de la baza teksto en Esperanto. Ni sugestas, ke oni kreu laborgrupojn por tradukado kaj plibonigo

de la tekstoj, preferinde kun la partopreno de la koncerna Landa Asocio. Se vi volas ricevi la tradukendajn dosierojn, bonvolu kontakti nin.

### Ĝisdatigo de la mondmapo

En nia retejo estas bela mondmapo, kiu montras esperantajn asociojn aŭ klubojn. Bonvolu viziti <https://esperanto.net/eo/lokaj-organizo/> kaj kontroli la informon pri via urbo. Vi povas tajpi la nomon de via urbo en la kadro aŭ premi la regklavon (CTRL) de via klavaro kaj samtempe ruli la centran radeton de via komputila muso por pligrandigi la areon serĉatan. Se vi trovas eraron aŭ mankon en la mapo, bonvolu indiki tion per nia formularo: <http://tinyurl.com/mondmapo>. Unu lerneja leciono pri Esperanto!

En la baza lernejo, ĉiuj devus lerni iom pri Esperanto, minimume per unu leciono. Tiu leciono povus okazi kadre de la instruado de fremdaj lingvoj, aŭ de aliaj temoj (ekz. historio, sociaj kaj politikaj sciencoj). Konatiĝu kun la baza ideo de Klaus Friese, kiu vizitis jam pli ol cent lernejojn en Germanio: <https://esperanto.net/eo/leciono/>.

### Kunagu kun ni!

Ĉi tiu retejo apartenas al vi. Uzu ĝin kaj helpu nin disvastigi ĝin al ĉiuj. Indiku la retejon al viaj ne-esperantistaj amikoj. Plusendu tiun mesaĝon en la diskuto-listoj kaj grupoj en via lingvo. Partoprenu!



## EKRA- 2019 en Razgrad, Bulgario por 30-a fojo

La 07an – 09an de junio en Razgrad, Bulgario okazis por 30a fojo jam tradicia Esperantista Krea Renkontiĝo “Abritus”, organizita de la Esperantista Domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev”. Nian feston partoprenis la prezidanto de la Bulgara Esperanta Asocio s-ro Boris Gadĵanov, Maja Gorova – vicprezidanto de BEA, Georgi Mihalkov – ĉefredaktoro de revuo “Bulgara esperantisto” k.a. Krom bulgaraj gastoj nin ĝoigis la gastado de niaj amikoj el Serbio-Nebojsa Stankoviĉ el Niš kaj el Rumanio – familio Jonel kaj Gabi Zorila.



La 07an de junio en RB “Prof. Bojan Penev” okazis solenaĵo, dediĉita al la eminenta elstara bulgara esperantisto Ljubomir Trifonĉovski, longjara ĉefredaktoro de la internacia esperanta revuo “Literatura foiro” kaj prezidanto de la ĵurio de nia internacia literatura konkurso por poezio kaj humuro EKRA, kiu en 2018 estiĝus 60jara. Gesinjoroj Ivaniĉka Maĝarova kaj G. Mihalkov, kiuj laboris kune kun Ljubo, nia amiko, kaj bone konis lin, parolis varme kaj emocie pri li.

La 08an de junio en la artgalerio “Prof. Ilija Petrov” okazis aranĝo, dediĉita al du gravaj por ni jubileoj: 95 jaroj – organizita Esperanto movado en Razgrad kja 35 jaroj – Esperantista domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev”. Dum la solenaĵo estis anoncitaj la rezultoj de la du konkursoj – la Internacia konkurso por originala esperanta poezio kaj humuro kun prezidanto de la ĵurio Venelin Mitev – elstara bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, esperantisto kaj ĵurianoj: Josip Pleadin – elstara kroata verkisto, eldonisto, esperantisto kaj Ivaniĉka Maĝarova – longjara esperantistino kaj verkistino; La dua konkurso por traduko el bulgara okazas por 6a fojo. Ĝia ĵurio konsistas el: Marina Kumanova – prezidanto, denaska esperantistino kaj instruistino, D. Kateva – instruistino, filologo kaj Georgi Mihajlov – multjara esperantisto,

kelkfoje gajninto de la unua premio por traduko.

Partoprenis 12 personoj el 8 landoj.

Specialan premion pro hajko-poezio ricevis Elena Popova el Dobriĉ, Bulgario.

Unuan premion ricevis Evgenij Leonidoviĉ Georgiev ( Espopore) el Karaganda, Kazahio.

La unuan premion pro traduko el bulgara en esperanton ricevis Hasan Jakub el Omurtag.

Ĉijare la bulgaraj esperantistoj tradukis la rakonton “Amo” de Iv. Maĝarova . Ni ĝojas, ke la rakonton esperantigis ankaŭ Evgenij Georgiev el Karaganda, Kazahio, kiu ricevis duan premion.



### PROTOKOLO №2

Hodiaŭ, la 07an de junio, 2019, ĵurio en konsisto: prezidanto Venelin Ivanov Mitov – poeto, ĵurnalisto, eminenta bulgara esperantisto kaj tradukisto, kaj membroj: Josip Pleadin- eminenta kroata esperantisto, verkisto , ĵurnalisto kaj eldonisto kaj Ivaniĉka Rajkova Maĝarova – vicprezidanto de EDK “D-ro Ivan Kirĉev” DECIDIS:

Atribuas jenajn premiojn:

#### I. POR POEZIO:

**Specialan Premion** al Elena Popova el Dobriĉ, Bulgario pro ciklo de hajko-poezio al Lili Dimkova – portretoj kaj pejzaĝoj kaj humuraĵoj`

**1. Unuan premion** : al Evgenij Georgiev el Karaganda, Kazahio pro ciklo da versoj: “Malnova romance” , “Soneto”, “Makulo”

**2. Duan premion** : al Nikolaj Neĉaev el Svirsk, Ruslando pro “ Akveroj akvarele”

**3. Triajn premiojn:**

**3.1.** al Nilde Barros Diuana el Niteroj, Brasilo pro “Kiu diris tion”

**3.2.** al Dimitrije Janiciĉ el Belgrado, Serbio pro “La hejmlanda tombejo”

**Instigan premion:** Nebojsa Stankovi el Niš, Serbio pro “Kaj mi denove”

#### II. POR HUMURO:

**1. Unuan premion** al Jadranka Miriĉ el Zajĉar, Serbio

pro "Miskompreno"

**2. Duan premion** al Elena Popova pro ciklo da hunuraĵoj

**3. Trian premion** al Vasil Kadifeli el Istanbul, Turkio pro "Telesekretaria maŝino"

**Instigan premion** al Radka Stojanova el Razgrad, Bulgario pro ciklo da humuraĵoj

**ĴURIO:**

Prezidanto: **Venelin Mitov**

Membroj: **Josip Pleadin, Iv. Maĝarova**

sendis **Dimitrinka KATEVA** el Razgrad, Bulgarujo

### Lili Dimkova – Portretoj kaj Pejzaĝoj

### -- EKRA2019 speciala premio, branĉo poezio

1. Portret' de Kristo  
el fajrjeta lumeco.  
Am' en la rigard' .

---

2. Duno – rigardo  
en la homa animo.  
Radianteco.

---

3. Levsky – gvidanto,  
sinonim' de Libero.  
Luma mantelo

---

4. Bojan la Mago –  
rigardo al la estont'.  
Brila vizaĝo.

---

5. Spirit' de Amo –  
neniu nin forgesas.  
Fajra aŭreol'.

---

6. Dimkov – modesto  
kaj sindonemo. Devo,  
kiel misio.

---

7. Patrino – amo  
pro donacita vivo.  
Sent' el ventoblov'.

---

8. "Simona" – portret'  
inter floroj. Infana  
senkulpeco. Ja.

---

9. Forta spirito  
en fraŭlina rigardo.  
Kosma ligado.

---

10. Penso kaj sento  
unuecaj en promes' .  
Virina rigard'.

---

11. Bluaj okuloj  
sur junulina vizaĝ' .  
Luma ĉirkaŭpren'.

---

12. "Homa amo" en  
junulina dorm'. Floroj –  
fonto de forto.

---

13. Super arbaro –  
esper' el ĉielarko.  
Vojo sub arko.

---

14. Granda monahej',  
gardita de montaro.  
Hela aŭreol'.

---

15. La arboj – ligo  
de la Ter' kun la Kosmo.  
Kaj kun la Homo.

---

**Tera Ido**  
Elena Popova, Bulgario

### La Hejmlanda Tombejo

### -- EKRA2019 tria premio, branĉo poezio

Kiam mi vicigis kolieron de jaroj  
tempo forviŝis multajn postsignojn  
sed mi plie klopodas trovi  
ŝlosilojn de perditaj momentoj  
dum mi sonĝon donas al ĉiutageco  
el kiu min trafas matura doloro  
kronita per malsata sopiro  
kaj mi vundita per senforteco  
ellasas la mutan krion  
ĉar mi ne povas ripozi  
sur mola kuseno de sonĝoj.

Estanteco ŝarĝita per problemoj,  
amikoj foriris en nekonatan eternecon  
ĉielarkaj koloroj de juneco fariĝas grizaj  
kaj la morto jam tiom proksimiĝis  
ke bonajn aferojn oni ne prolongu por morgaŭ.

Mi revenas al sincereco  
kiel privilegio de principemuloj

provante forkuri de banaleco  
helpe de ŝtelitaj momentoj  
ĉar mi ne vidas homojn  
krom en plenplena  
hejmlanda tombejo.

Iliajn ŝtonajn epitafojn  
mi karesas per rigardo  
konscia kiel trapasas vivo  
kaj kiel tempo viŝas postsignojn  
de donitaj promesoj, doloraj larmoj,  
neeldirita izoleco  
kaj de araneaĵaj lunlumaj deziroj  
ripetante malnovan sentencon  
kiu ĉion egaligas:  
„Mors certa, hora incerta.“

**Adiaŭo19**

Dimitrije Janiciĉ, Belgrado, Serbio

## BLANKA BALENO (Moby Dick)

**K**apitano Ahab kaj "Moby Dick"... Du nomoj, kiuj restis klare en mia menso el la filmo, kiun mi spektis dum mia infaneco. Moby Dick; estas ĉefverko de literaturo, kaj la filmo estas unu el la neforgeseblaj kinoartoj, adaptita de direktoro John Huston kaj sciencfikcia verkisto Ray Bradbury.



Herman Melville ne multe sukcesis en sia vivo. Kvankam li akiris famon per siaj unuaj verkoj, Moby Dick ne fariĝis populara tiutempe. Tamen pli poste ĉi tiu verko fariĝis unu el la ĉefverkoj de Literatura Historio. Albina spermbaleno "Mocha Dick" estis mortigita en la jaro 1838 proksime de Mocha insulo ĉe la ĉilia marbordo. Ĉi tiu besto, kiu estas kutime kvieta, fariĝis sovaĝa post la atakoj de balenĉasistoj. Antaŭe ĉi tiu besto defendis sin de 100 apartaj atakoj kaj finfine estis mortigita. Legante la rakonton de Jeremiah N. Reynolds en "The Knickerboker" revuo, Melville evidente estis impresita de ĉi tiu baleno. Ĉu tio ne estas evidenta ankaŭ pro la simila nomo?

La romano estis publikigita en 1851 kaj poste en 1956 John Huston faris la filmon. 105 jarojn poste, la rakonto de la blanka baleno, de la balenĉasisto Kapitano Ahab kaj de la ŝipanaro estis revivigita sur la ekrano. La Ahab-karaktero kaj la baleno estis interpretitaj malsimile de la spertuloj de literaturo. Mina Urgan, unu el la turkaj tradukistoj de la libro, citis: "Tamen, ĉar Moby Dick aldonis novan «miton» al nia epoko, ĉiu kritikisto faris malsimilan interpreton de ĝi: Ekzemple, laŭ Van Wyck Brooks, Moby Dick, similas al la monstro Grendel en la epopeo de Beowulf, ĝi estas la bildo de sovaĝaj fortoj de la naturo; laŭ William S. Glein, ĝi estas destino; laŭ Henry Pommer, ĝi estas Dio; laŭ William E. Sedgewick, ĝi estas la nesolvebla sekreto de la universo; laŭ Aileen Wells Parks ĝi eĉ estas la ekspluatata klaso surbaze de mono kaj peza industrio. Kiel Leon Howard diris, la intelektuloj de nia epoko,

vidis en Moby Dick tion, kio ilin plej timigas. Dume, la Freŭdistoj kaj Jungistoj faris siajn psikanalizajn interpretojn de Moby Dick. Ekzemple, Mumford diris ke ĝi estas la subkonscio; Newton Arvin argumentis, ke ĝi estas simbolo de malamata patra aŭtoritato kaj subpremo. D.H.



Lawrence vidis Moby Dick, kiel simbolo de la seksa potenco, kiun la blanka raso perdis psikologie. Sed por kapitano Ahab, Moby Dick estas nur simbolo de ĉiuj malbonoj; kaj lia rankoro kontraŭ ĝi estas tiom terura, ke kapitano Ahab freneziĝis pro sia malamo, kiel tiuj, kiuj freneziĝas pro sia amo."

Mi mem volus interpreti ĝin, kiel ŝatanto de bestoj kaj naturo. Ĉi tio estas rakonto pri senkompato kaj malamo, en kiu maristoj, kiuj sekvas ambician viron kaj gajnas sian panon pro ĉi tiu laboro, uzas la oleon de la baleno, kiun ili mortigis perfide kaj provizas oleon al la industrio tiutempe. Balenĉasistoj mortigas balenojn. Ho ve Homo! Ĉu vi ne finos la malutilon, kiun vi faris al naturo kaj bestoj? Sed eble vi demandos: "Ĉu vi ne utiligas al tio eĉ nerekte?" Mi ne scias, ĉu mi profitas el la amasmortigo de balenoj, sed mi scias, ke la medikamentoj, kiujn mi uzas oni eksperimentas sur kobajoj. Jes, mi manĝas viandon, mi manĝas fiŝon. Mi estas nekohera bestoamanto. Sed mi ankoraŭ kompatas, ĉi tiujn mamulojn. Ĉi tiuj grandegaj vivaĵoj, ne fariĝus agresemaj se ni ne atakus ilin. Eble neniu besto atakus nin, se ni ĝin ne tuŝus. Viro ankaŭ estas besto. Ĝuste tiel, kiel la baleno deŝiras la hepaton de grandaj blankaj ŝarkoj, homo ankaŭ ĉasas same, kiel membro de la besta regno.

Ĉu albino aŭ parte blankaj balenoj troviĝas en reala vivo? La fama balenfotisto Flip Nicklin fotis veran Moby Dick naĝantan kun sia patrino for de la Acoro-insuloj antaŭe, kaj la foto estis publikigita en la "National Geographic Magazine" revuo tiutempe. Alia





**Ĉ** iuj viroj, ankaŭ la plej grandaj herooj, havas sian vundeblan punkton, sian aŭtilan kalkanon. En la helenaj mitoj plej ofte trafanto de tiu delikata vira punkto estas virino!

Mi diras tion, ĉar tiu ĉi mia rakontado koncernas Heraklon, la duondion, plej grandan heroon de ĉiuj epokoj, kies komenco kaj fino estis markitaj de venena virina pasio.

Por priskribi la tutan vivon de la heroo, oni bezonas centojn da paĝoj, do, mi rakontos nur la plej signifajn, la plej krizajn, liajn vivpunktojn, nome lian komencon kaj lian finon.

Estas mult-foje dirite, ke la reĝo de la Olimpaj Dioj, Zeŭso (Ζεὺς), estis viro ĝuema, ekstreme virinama. Tio signifas, ke li ne povis sin deteni de la amorpasio kiun tre ofte vekis al li la ĉarmo, la beleco kaj aliaj ecoj de certaj, didevenaj aŭ mortemaj virinoj. Unu tia virino estis Alkmēna (Αλκμήνη), la bela edzino de Amfitriono (Αμφιτρίων), ekzilita reĝo de Tirinto (Τίρυνς). La pasio de Zeŭso al Alkmēna estis neordinara, li ne nur deziregis la virinon, sed li estis decidinta akiri de ŝi sian plej fortan, plej kuraĝan morteman filon, tiun, kiu iĝus la granda heroo, protektanto kaj helpanto de la homoj, do, persekutanto kaj punanto de ĉiuj monstroj, krimuloj kaj malbonuloj. Zeŭso bone sciis, ke Alkmēna estas virino prudenta, fidela al sia edzo, tiel li sciis, ke li ne povas alproksimiĝi al ŝi prenante sur sin formon de ordinara viro, do, li decidis ŝin trompi alimaniere. Kiam Amfitriono estis en militekspedicio, malproksime de sia hejmo, Zeŭso prenis sur sin ties formon kaj prezentiĝis al Alkmēna, dirante al ŝi, ke la milito sukcese finiĝis kaj li revenis hejmen. Li alportis al ŝi valorajn donacojn el la milit-predo, li rakontis al ŝi interesajn okazintaĵojn de la bataloj kaj post nelonga ripozado, li montris sian deziron kunkuŝi kaj kuniĝi kun ŝi. Unu tagon antaŭe li estis petinta de la dio Helio aŭ Suno (Ἥλιος), ke li ne aperu tri sinsekvajn tagojn. Tiel, tiu kunkusiĝo daŭris tri plenajn ordinarajn noktojn. Zeuso ĝuis sian amatinon tiom longe, por esti tute certa pri la naskiĝo de la favorata ido. Estas pro tio, ke



al Heraklo estis donitaj la alnomoj “trinokta” (τριήμερος) kaj “triluna” (τριμήνη). La longa nokto pasis, Zeŭso malaperis kaj tuj post tio, Amfitriono revenis hejmen. Surprizite li rimarkis, ke lia edzino ne montris la ordinaran kaj atenditan ĝojon, ke post lia tiom longa foresto ŝi ne montris kontentecon, ŝi ne akceptis lin tenere kaj ameme. La nokton, kiam li kuniĝis kun ŝi, li konstatis, ke ŝi estas tute senpasia, apatia, nesentema, do, ofendite kaj indigninte li petis pri eksplikoj. Alkmēna, mirante pro la neordinara seksavideco de ŝia, kutime prudenta kaj modesta, edzo, plendis al li pri lia konduto; ŝi memorigis al li la pasintan ilian tiom longan nokton, la varman akcepton kiun ŝi faris al li kiam li atingis la hejmon, kaj ŝiajn karesojn kaj varmajn kiŝojn, per kiuj ŝi dankis lin pro liaj belegaj donacoj. Ĉio tio ĉi ĝenis, maltrankviligis, kaj, kompreneble, konfuzis Amfitrionon, kiu tamen tute embarasiĝis kiam li vidis en la manoj de sia edzino la donacojn, kiuj devis esti ankoraŭ en liaj kestoj. Li komprenis, ke lia edzino estas tute sincera, do, li komencis pensi ĉu li eble estas malsana, ĉu li perdis sian sinregadon pro ia frenezatako. Fine, la eksplikoj estis donitaj de Tirezio (Τειρεσίας), la plej bona divenisto de la tuta tiama helena kaj barbara mondo. Jes, kulpa estis Zeŭso, do, Amfitriono devas esti ne kolera, sed trankvila, eĉ kontenta kaj fiera, ĉar li estis favorigita de Zeŭso, iĝi la adopta patro de la plej granda heroo, de la plej glora filo de la direĝo.

Intertempe, kiel ĉiam okazis, la granda diino Hera, la ĵaluza edzino de Zeŭso, estis informita pri la nova adulto de ŝia edzo. Ordinare, ĉiufoje kiam la dio sukcesis ŝin trompi kaj kaŝe eniĝi en la liton de bela mortemulino, la diino faris la kutiman kverelon kaj poste ŝi forgesis la aferon, ĉiufoje decidante esti en la estonteco pli atentema. Tamen, tiun fojon atingis ŝin ne nur la ordinara informo, sed ankaŭ la detaloj de la mispaŝo de ŝia edzo, precipe tio pri la volupta noktortio, privilegio kiun ŝi neniam ĝuis, kaj pri la decido de la perfidulo akiri sian plej gloran idon pere de Alkmēna. Ekde tiam, Hera iĝis la plej granda malamiko kaj nevidebla venĝinto de Heraklo, kiu post nelonge naskiĝis.

Tiu estis la komenco, tiu estis la eniĝo de Heraklo en la vivon, kaj tiu komenco estis markita de forta virina pasio, de forta virina malamo, kiu igis la vivon de la heroo ne priskribeble malfacila.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, la malhelpoj, la suferoj, kiujn kaŭzis al li tiu persekutado de Hera, Heraklo iĝis





ekzakte tio, kion Zeŭso atendis, la nevenkebla, temerara heroo, la plej amata bonfaranto de la suferantaj homoj. La priskribo de la aventuroj kaj bravaĵoj de Heraklo postulas centojn da paĝoj, mi iras, do, rekte al la epoko, kiam la heroo iris al Kalidono (Καλυδών), la patrujo de lia mortinta amiko Meleagro (Μελέαγρος), filo de la loka reĝo. Tie, Heraklo konatiĝis kun la reĝidino, fratino de sia amiko, la belega Dejanira. Post nelonge li enamiĝis al ŝi kaj petis de la reĝo ties manon. Dejanira reciprokis la amsentojn de Heraklo, tamen ŝia patro devis elekti inter du same noblaj kaj potencaj kandidatoj, inter Heraklo kaj Aĥeloo (Αχελώος). Tiu Aĥeloo estis dio-rivero, estaĵo tre stranga, kiu povis laŭplaĉe preni sur sin tri diversajn formojn, tiun de homo, aŭ de serpento, aŭ de taŭro. Heraklo donis solvon al la hezito de la reĝo kaj la maltrankvilo de Dejanira, li provokis sian rivalon al lukt-batalo, kiun la fiera kontraŭulo senhezite kaj arogantece akceptis. Li sin prezentis sur la lukt-tereno sub formo de grandega, sovaĝa taŭro. La batalo estis kruela kaj tre longa, ambaŭ kontraŭuloj estis tre fortaj kaj spertaj lukt-batalantoj, tamen, unu momenton, Heraklo sukcesis ne nur lerte eviti unu ankoraŭ kornatakon, sed ekkapti la grandajn kornojn de sia kontraŭulo. Tiel, Aĥeloo perdis sian solan atakpovon, ĉar, malgraŭ la fortegaj puŝoj, saltoj kaj piedbatoj, la feraj manoj de Heraklo tenis la kornojn forte, tiom forte ke post nelonge li sukcesis derompi unu el ili. Post tio la lukto estis finita, Aĥeloo konfesis sian malvenkon, sed li petis de Heraklo, ke li redonu al li lian derompitan kornon. Heraklo volonte faris tion kaj Aĥeloo lin kompensis, donacante al li la abundokornon (κέρας της Αμάθειας), la ĝisnunan simbolon de abundo kaj prospero, al kiu la Helenoj donis la nomon de Amaltia, la nimfo kiu gardis kaj nurtis Zeŭson, kiu, tuj post sia naskiĝo, estis kaŝita, zorge de lia patrino Rea (Ρέα), en monta kaverno de Kreto (Κρήτη). El tiu, do, abundokorno, laŭ la deziro kaj bezonoj de la posedanto, eliĝis senĉese abundo da nutraĵoj kaj trinkaĵoj. La mirindan donacon de Aĥeloo Heraklo donis al la reĝo Ojneo (Οινεύς) por la bezonoj de la popolo de Kalidono kaj tuj poste li edziĝis kun la feliĉa Dejanira, kiu senmezure amis sian edzon.

Post kelkaj jaroj, pro kialoj, kiuj povus esti temo de alia rakontado, Heraklo kun sia familio foriris de Kalidono, por iri al Traĥiso (Τραχίς) de Tesalio (Θεσσαλία). Kiam ili atingis la larĝan riveron Eŭveno (Εύηνος), ili devis peti pri la servo de centaŭro nomata Neso (Νέσσος), kiu havis la taskon pasigi la vojaĝantojn al la kontraŭa bordo. Dejanira sidis sur la dorso de Neso, sed Heraklo decidis trapasi la riveron naĝante. Kiam la centaŭro trapasigis la belan

Dejaniran kaj vidis ke Heraklo estis ankoraŭ tre malproksime, sur la kontraŭa bordo, komencis malafable amindumi la virinon, unue per paroloj, poste per faroj, ĝis kiam li provis seks-perforti ŝin. Dejanira komencis forte ekkrii, tiel ke Heraklo aŭdis ŝin. Neso sciis nenion pri la nenormale akra aud- kaj vidkapablo de Heraklo kaj pri ties eksterordinare forta ark-pafo, do, malgraŭ la kriegoj kaj la leona rezistado de la virino, li klopodadis ŝin senmovigi kaj perforti. Li faris tion ĝis kiam trafis lin surbruste la neerarebla sago de Heraklo. La grand-korpa centaŭro, trapikite de la dika sago, falis kaj abunda sango elfluis el lia vundo kaj tute farbis lian tunikon. Kompreninte ke restas al li nur kelkaj minutoj, petis pardonon de Dejanira, li gratulis ŝin pro ŝia edzina prudento kaj li donis al ŝi sian sangofarbitan tunikon, dirinte al ŝi, ke lia donaco havos magian efikon sur la viro, kiu ĝin surportos, ĉar tiu viro neniam ĉesos pasie ami kaj neniam perfidos la virinon kiu ĝin donos al li. Dejanira, en sia konfuzo, ne longe pensinte, prenis la tunikon, ŝi metis ĝin en sian sakon kaj tie ŝi forgesis ĝin.



Dum lia plenaventura, turbulema vivo, Heraklon kortuŝis multaj virinoj, sed tiu, kiun li vere plej multe amis, estis lola (Ιόλη), eble la plej bela virino naskita en la tuta helena lando. Lola estis filino de la potenca reĝo de Ojĥalio (Οιχαλία), Eŭrito (Εύρυτος). Multajn jarojn antaŭ lia edziĝo kun Dejanira, Heraklo, arde enamiĝinte al lola, petis ties manon de ŝia patro. Malgraŭ tio, ke en la komenco la reĝo el inter multaj kandidatoj montris sian favoron al la heroo, pli poste, ofende li rifuzis al li la junulinon, kaj Heraklo, humiligite, estis devigita foriri. Tamen, li neniam forgesis lolan kaj la grandan ofendon de Eŭrito, do, neniam ĉesis pensadi pri sia venĝo. Nu, kelkan tempon post la enlokiĝo de lia famlio en Traĥiso,

Heraklo kaŝe kaj atente preparis kaj efektivigis neatenditan militatakon kontraŭ Oĵhalio. Post nelonga milito, li venkis Eŭriton, li mortigis lin kaj liajn filojn, li detruis la urbon kaj forirante prenis kun si grandan trezoron, sed ankaŭ lolan. Dezirante starigi altaron por honori kaj danki Zeŭson, li iris rekte ĉe elektita kabo de la insulo Eŭbeo (Εύβοια), kie li preparis serion da solenaj ceremonioj. Per kelkaj liaj sekvantoj li sendis lolan kaj la milit-predon al sia palaco en Traĥiso. Ĉio estis liverita al Dejanira, kiu zorgis ne nur pri la valoraj militakiraĵoj, sed ankaŭ pri la forrabita reĝidino. Dejanira sciis ĉion pri la malnova amo de Heraklo al lola kaj kiam ŝi vidis ŝin por la unua fojo, kiam ŝi vidis ŝian troan belecon kaj ĉarmon, ŝi sentis fortan kordoloron, komencis pikadi ŝin maltrankvilo kaj timo. Kompreneble, ŝi montris nenion al la fremda reĝidino, ŝi oferis al ŝi luksan kaj komfortan restadejon en la palaco kaj ŝi prizorgis ŝin reĝdece. La bonkora kaj afabla Dejanira faris ĉion tion ĉi, sed ŝi falis en malesperon; ŝi timis, ke ŝi perdos sian tiom amatan edzon. Ŝi sciis, ke ŝi ne povas konkuri kontraŭ la fremda belulino por teni apud si la amatan viron. Ŝi estis malfeliĉa, ŝi luktis kontraŭ la plej nigraj pensoj, ŝi febre serĉadis pri solvo, pri helpo, pri savo, kaj, subite, ŝi ekmemoris la teruran centaŭron, ties lastan donacon, kaj, jes, ŝi estis certa, ke ŝia problemo estas solvita, ke la dioj sendis al ŝi la savon. Ŝi trovis sian malnovan sakon kun la magia tuniko kaj per servisto sendis ĝin al Heraklo, kun la mesaĝo, ke li surportu la sanktigitan tunikon dum la solena, granda sanktofero.



Heraklo ĝojis pro la tia zorgo de lia edzino kaj kiam ĉio estis preta, kiam la pastroj, la nobeloj, la oficiroj kaj la soldatoj kolektiĝis ĉirkaŭ la altaro, li surportis la fatalan tunikon.

Kio estis? ĉu la daŭra, neestingebla malamo de

Hera? ĉu la lasta malica intenco, la kruela venĝo de Neso? Mi ne scias; mi nur scias, ke la tuniko estis venenita, ke la ŝtofo, algluiĝinte sur la karno de Heraklo, komencis bruligi ĝin, tiel, ke la nevenkebla heroo freneze sin turnante kaj ruliĝante sur la tero, suferegis pro neelteneblaj doloroj. Lia plej aĝa filo, Ilo (Υλλος), transigis lin al Traĥiso, sed, malgraŭ la klopodoj de la plej spertaj kaj bonaj kuracistoj, de la plej piaj pastroj, la farto de Heraklo ne ŝanĝiĝis, la brula, daŭre mordanta doloro ne ĉesis, ĝi iĝis pli kaj pli forta, eĉ de dio neeltenebla. Heraklo komprenis, ke nenio povas ŝanĝi la situacion, li sciis, ke lia vivo atingis la finon, do, li petis de sia filo transigi lin sur la plej altan lokon de la monto Oĵto (Οἶτη) kaj tie fari grandan ŝtiparon. Kiam ĉio estis preta, Heraklo suriris sur la ŝtiparon, li adiaŭis siajn filojn kaj kunulojn kaj li mem ekbruligis la fajron.

Tio estis la fino kaj samtempe nova komenco por la nekomperebla, granda heroo. Kiam la unuaj flamoj ekleviĝis, mirakle komencis fulmi kaj tondri kaj tre densa nubo tute kovris, malaperigis ĉion. Tio ne daŭris longe, post minutoj la subita mallumo, la densa nubo malaperis kaj sur la ŝtiparo estis nenio. Ankaŭ Heraklo malaperis, tamen neniu miris, ĉiuj sciis, ke la dioj prenis kaj kondukis lin al Elizeo (Ηλίσια Πεδία), al la mondo de la eterna feliĉo kiun ĝuas la senmortaj duondioj kaj herooj.

Por esti plena la lasta akto, mi aldonu, ke kiam Dajanira eksciis kion ŝi senvole faris al sia tiom amata edzo, ne eltenis sian malfeliĉon, ŝi prenis stileton kaj mortige sin pikis je la koro.

Jen, do, la komenco de la malfacila vivo de Heraklo estis markita de forta virina malamo kaj lia terura fino estis markita de alia, same danĝera virina sento, de troa amo kaj ĵaluzo!

Kio, do, estas pli forta? ĉu la viraj muskoloj aŭ la virinaj pasioj? Sendube, Heraklo bone scias la respondon!

### --- el GEMOJ EL LA HELENA HISTORIA KAJ MITOLOGIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

## Hendrik Adamson (1891-1946)

**D**u estonaj poetoj nun okupas mian menson, Hilda Dresen kaj Hendrik Adamson. Iliaj verkoj aperis dum la intermilitaj jaroj en revuoj ĝis Stafeto, la fama eldonejo de Régulo Pérez en Kanariaj Insuloj, aperigis ilin libroforme. Pri Hilda Dresen mi verkis artikolon por tiu ĉi serio (Juna amiko, n-ro 117, 2006).



La elektitaj poemoj de Hendrik Adamson, sub la titolo Vesperkanto, aperis nur en 1967, 21 jarojn post lia morto, kun antaŭvorta eseo de Hilda Dresen pri li kaj lia verko. Ŝi konis lin bone kaj konsideras lian sorton kun profunda komprenemo. Mi ĉerpas el ŝia eseo kelkajn faktojn:

Hendrik Adamson naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Kärstna, kampara loko en Sud-Estonio. Liaj gepatroj estis malriĉaj. Li elstaris kiel la plej bona lernanto en la loka lernejo kaj poste studis en la Pedagogia Seminario en Tartu. En 1911 li ricevis postenon kiel instruisto en kelkaj kamparaj lernejoj, 1919 -1927 en sia hejmloko en Kärstna. En 1927 li serioze malsaniĝis kaj ricevis malgrandan pension. Dum la militaj jaroj, 1940-1945, li penis labori denove kiel instruisto, sed tio superis liajn fortojn. Sian lastan vivojaron li plejparte pasigis en la lito.

Esperanton li eklernis fine de 1929 kaj jam en 1930 li ekverkis originalajn poemojn en tiu lingvo. Sed multajn jarojn antaŭe li provis sian poetan talenton verkante en sia gepatra lingvo, la estona. Liaj estonlingvaj versaĵoj aperis en gazetoj ekde 1913, lia unua poemaro en 1919. En 1965 estis eldonitaj poemoj elektitaj el liaj ses estonlingvaj poemaroj en la intermilitaj jaroj. Multaj estas verkitaj en lia loka dialekto. Pro tio Hendrik Adamson estas kondiderita aparte meritplena poeto en sia gepatra lingvo.

Hendrik Adamson estas esence melankolia poeto. Tamen, Hilda Dresen, komparante liajn estonlingvajn poemojn kun la esperantaj, diras en sia eseo, ke "oni devas konstati ke en la esperantaj estas troveblaj relative pli multe petolaj kaj ĝojaj sonoj ol en la estonlingvaj." Probable ŝi pravas. Enkonduka poemo anoncas la deziron de la poeto esprimi la tutan gamon de sentoj, kaj ne perdiĝi en negativaj plendoj. Jen la unua kaj lasta strofoj:

*Mi ludas sur la kordoj*

*pri ĝojo kaj malĝoj',  
kaj frapas sur la pordoj  
apud la fremda voj'.*

---

*Ĉar fajron aŭ fajron  
enhavas ĉiu poem',  
vi trovos sub literoj  
la sparkon por vi mem.*

La poeto esprimas la konvinkon, ke liaj poemoj havas valoron, kiun la leganto trovos, ĉiu laŭ sia animstato. Ĉar la poezio de Hendrik Adamson rivelas lian animon en tia simple sincera maniero, ke liaj eldiroj facile trovas aliron al sentema leganto. Ofte lia spirito estas kadrita en cirkonstancoj kiuj elvokas trankvilon, kiel en la poemo Nokte:

*Staras betuloj duvice,  
susuras en vento vespera,  
Floroj odoras delice,  
murmuras ondaro rivera.  
Nokto sternaĝas kvieta  
kun mola vindaj' de nebuloj,  
en meditado pieta  
mi iras, dum flustras betuloj.*

Sed pli ofte cirkonstancoj elvokas melankolon kaj senton de soleco randanta malesperon. Tiel en la poemo Krepusko:

*Dum gaje lumetas lampiroj  
kaj ŝvebas la flora odor',  
ĉirkaŭe flugadas vampiroj  
kaj suĉas la sangon el kor'.  
Pepadas birdet' en arbusto  
dum dolĉa vespera langvor',  
sed mordas senĉese en brusto  
timige – terura angor'.  
Aŭdiĝas la vesper-sonorado,  
al bronzo puŝiĝas frapil',  
resonas ĝi kiel plorado ...  
La vivo – inkuba delir'.*

Sed la poeto ankaŭ havas pli malpezajn momentojn, ekzemple en la poemeto Hej! li kuraĝigas kaj instigas la homojn al vigla agado per milda ironiemo, dum la vivo daŭras:

*Tiklu, tiklu gorĝon rido,  
vivi viglu, hej, homido,  
kun la korpo, kun la kor',*



*dum la viv' ne flugis for.  
Tiklu, tiklu gorĝon rido,  
vivi viglu, hej, homido,  
kiel el sunbrulo muŝ',  
ĝis la morto diras: huŝ!*

Laŭ mia scio literaturemaj esperantistoj ekkonis la poezian arton de Hendrik Adamson el la marta numero 1932 de la revuo Literatura Mondo. Du jarojn poste eldonis la revuo la antologion Dekdu poetoj, kiu enhavis dekunu poemojn de Adamson. Pri lia poezio Kálmán Kalocsay, kiu redaktis la libron, skribis: "Vere oni povas diri, ke ĉi tie la lingvo jam estas ne nur

instrumento, sed ankaŭ la temo mem." La arto de la poemoj tiom profunde esprimas la koncernajn temojn: ĉu solecon, senesperon, rezignon, naturan, amon, ofte miksitajn de ironiemo, ke oni volonte konsentas la diron de Kalocsay. Hendrik Adamson estas poeto, per kies poemoj oni sentas sin aktive partoprenanta ties anime sondeman arton.

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkita por la revuo Juna Amiko  
Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/adamson.html>

## EPITAFIO

## esperantigis Edward Jaśkiewicz el Pollando

Ĉu la lokojn pli trankvilajn al mi povas montri iu  
Al nekropoloj similajn? – ŝajnas tamen, ke neniuj.  
Edzo ne plu jam gvatata pro ĵaluzo de edzino,  
Plu ne estas jam serĉata de la knabo la knabino.  
Blankajn noktojn vi ne vidas, neniun io doloras,  
En varmegoj vi ne sidas, eĉ severaj vintroj foras.  
Nur kuŝas vi... Malgraŭ tio, ne doloras vin eĉ spino,  
Ne danĝeras dentkario, ne ŭrozo, aliinklino.  
Nek kancero vin danĝeras, nek malsanalkoholismo,  
Pro malsat' vi ne suferas, nek pro la alia ismo.  
Vento rekten al okuloj tie jam ne blovas tute.  
Plu ne mordas vin jam kuloj kaj edzino sidas mute.  
En eterna ĉi kuŝejo mono jam ne bezonata,  
Ĉar lupago por loĝejo tie ja ne aplikata.  
La abundo kaj mizero tie daŭras en konkordo,  
Do nenie sur la tero regas la simila ordo.  
Nek tumulto, nek kriado... Ĉiuj kuŝas en amasoj,  
Sanaj pulmoj sen fumado, ne ekzistas jam forlasoj.  
Pasis en ĉi lok' sufero, la plej laŭta nur silento.  
Kuŝas en la sama tero – juna, olda en konsento.  
Superflua la higieno, okulvitroj, manĝilaro,  
Ne turmentas jam migreno, ne plu estas kontraŭstaro.  
Ne ekzistas ŝerctrudistoj, nek perforto, nek ŝtelado.  
Kvankam estas la ŝtelistoj, nek vin tuŝos har-falado.  
Kuracisto, ĉarlatano, - bezonataj ne plu iĝos,  
Ĉar malsanoj en lok' tiu neniam evidentiĝos.

Tie ja ĉiuj knabinoj egalrangaj... Jen la fakto.  
Elvilaĝaj aŭ grafinoj... Ne plu estas jam infarkto.  
Urbkvartala policisto, profesoro kaj studento,  
Provoso, kriminalisto, kuŝas kune en konsento.  
En la milda ĉi klimato jam kvieta ĉi kuŝas.  
Ne militas jam soldato, nek unu alian tuŝas.  
Nenio en tiu domo estas jam plu bezonata,  
Nek la sperto, nek diplomo, nek ia aĵo amata.  
En la ĉi komuna rondo kune kuŝas la forstisto  
Kun bankiero, vagabondo – kaj la pastro kun ŝtelisto.  
Tie eĉ viroj, virinoj – adultojn, kokrojn ne timas,  
Reciproke la putinoj kun honestaj sin estimas.  
Stratlanternoj ne ekzistas, procesojn faras neniuj,  
Pro kalumni' vi ne tristas, ordo regas en lok' tiu.  
Vidas vi nek narkomanojn, nek la dipsomaniulojn,  
Vi ne spertas la ĉikanojn, ne bezonas vi spegulojn.  
Kuŝas tie stultaj, saĝaj, episkopo, monachino,  
Sveltaj, dikaj, diversaĝaj... ne ekzistas disciplino.  
Pli bone ol en ĉielo estas en ĉi terkaverno,  
Sed ne mankas la kruelo – kuŝo daŭras por eterne.



Aŭtoro: **Tadeusz Dulemba**

Esperantigis: **Edward Jaśkiewicz** el Pollando

**21>>** komprenis. "Mi povas recepti pomadon por viaj kruroj, se vi volas", mi sertis, sed ŝi respondis "Ne, ne, tute ne, ne estas tiel grava doloro...". Kaj pli-malpli tiel okazis la ĉiutagaj vizitoj –jes, ĉiutagaj– de la tri ĉarmulinoj.

Tamen, tre surprizis min, ke unu tagon, nur du el la fratinoj venis al la kuracejo. Mi tuj demandis: "kio pri via fratino? kial ŝi ne venis?", kaj unu el la du

respondis: "ho, ŝi ne fartas tre bone hodiaŭ." Tiaj ili estis.

verkis **Viktoro SOLÉ**, Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", **revuo Kontakto**, #281,  
2017:5, p.20

## Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

**L**a tabloj estis aliaj, la kurtenoj havis alian koloron, la lokalo ŝanĝis la nomon, en ĝi servis aliaj kelneroj, la malnova enirpordo apenaŭ videblis. Ĉio estis nova. Nekonataj vizaĝoj enireliris, knaboj kaj knabinoj junaj, gajplenaj kaj ĝojplenaj, ĉarmitaj bele, por ke ne povu eskapi al la diabla okulo, malgraŭ la senĉesaj malbenoj je ties direkto.

Dumvoje alvenante al vi mi ne iradis, sed kuradis per atleta rapideco, kiun la paŝo paŝon ne kaptas. Mi volis atingi ju pli frue al la loko, kie ni renkontiĝis ĉiamfoje, en la kafejo kie, antaŭ dekkvin jaroj, ni unuafoje kunkafumis. Atingi ju pli rapide en la kafejo, kie ni intervidiĝis unuafoje, interbabilis buŝgaje unuafoje, aldiris unu al la alia la unuajn vortojn.

Mi volis eksidi en la plej bela loko kaj atendi vin kiel tiam, ĝiskiam vi alvenus malrapide nombrante la paŝojn.

Mi estas irinta sur miloj da mondaj vojoj, sed neniu mi komparas kun la vojo irita de la studenta domo al la loko, kie mi renkontiĝus kun vi. Mi atendis tiom da aliaj knabinoj, sed neniu atendo havis la pezon de tiuj minutoj, kiam mi eksentis la paŝojn venigantaj vin al mi. Imagis mi vin alvenante al mi, aperis antaŭ miaj okuloj la spuroj de tiu irado sur la ĉefurba neĝo. Mi ne ŝanĝus tiun atendon per la furoraj ĝojoj de la plej feliĉuloj de la mondo!

Mi kafumis en centoj da mondaj kafejoj! Sed neniu el ili tremigis min kiel ĉi loko, kiu iam estis la nia. Survoje, alvenante al vi, mi pensis pri tio, kion vi aldirus min kaj kion redirus mi al vi post tiom da jaroj. Eble vi demandus min, kial mi komencis fumadi, kion vi tiam tiel multe malamamis kaj mi cerbumadis kiel respondi vin. Mi ne sciis ĉu mi dirus ke mi komencis tion, ĉar tio helpas min subigi la streson aŭ ĉar mi akompanatis kun ĝi ekde la tago, kiam vi, definitive, diris ke vi ne plu renkontiĝos kun mi?!

Eble vi dirus kial mi nun restas tiel mornvizaĝe?! Kial vi ne ridas, kial vi ne parolas pri io ajn, kiel tiam?! Kaj mi ne sciis kiel respondi. Mi hezitis, ĉu mi aldiru ke la laciĝo post ĉiutaga laboro estas influinta al mia konduto aŭ ĉar mia spirito jam malvarmiĝis, ekde kiam vi foriris.

Vojo plena je tremantaj supozoj, ne travivitaj ekde longe. Vojo kiu turnis la tempon jen malantaŭen, jen antaŭen.

Finfine, mi eniris en nia kafejo, ne plu konis ĝin kaj, je mia miro, vi estis alveninte antaŭ mi, kiel neniamfoje

antaŭe. Tio surprizigis kaj mirigis samtempe min, ĉar mi ne sciis ĉu mi ĝojiĝu pro via frua alveno, igante min esperi ke vi ankoraŭ sentis ion por mi aŭ mi ĉagreniĝu, ĉar tiaĵo rompis la sorĉecon de la iamaj atendoj.

La kafejo akiris alian formon, tion ni konstatis. kaj en ĉiu tiu kurbo de ŝanĝiĝoj ne estis escepto ankaŭ mi kaj vi, jam perdinta la iaman brilon de la nigra hararo. La viaj estis riĉigitaj per kelkaj blankharoj, dum ĉe mi la haroj forfalis nerimarkite de tago al tago. Vi ne plu havis vian harplektaĵon, kvazaŭ korvkolora ŝnuro, kiun alfrapis la vento, jen maldekstren, jen dekstren, ĝiskiam mia dekstra mano tenis ombrelon- ŝildon. Ankaŭ mi, en la alia flanko, ne plu havis la bulkojn, kiuj aliflanke, ombrigis mian frunton.

Hodiaŭ ni ne eksidis proksime kaj apudege unu al la alia, por ke mia mano karesu vian hararon dum la via kapo ripozu sur mia brusto, kiel ĉiamfoje en niaj rendevuoj. Hodiaŭ unuafoje, ni eksidis alfronte, je distanco preskaŭ unu metro. Ne ĉar mi atendis tion, sed, la veron dirante, tiu distanco embarasigis min, ekde la komenco de tiu momento, kiun mi tiel multe tutanime deziris.



Ĉio komenciĝis malvarme, tiel kiel estis malvarma tiu tago kaj tiu kafejo decembreze. Ni parolis pri niaj ĉiutagaĵoj, pri la laboro kaj sukcesoj. Rakontis ni unu al la alia pri niaj infanoj, pri ŝia filo kaj pri du miaj filinoj, pri la ridoj kaj edukiĝon iliajn. Sed neniumomentete dum tiuj minutoj, ni apenaŭ parolis eĉ vorton pri ni mem. Pasis, kiel neniam antaŭe, la tuta tempo sen iu ajn sentofrapo. Kaj ĝuste en la sekundo, kiam mi decidis fini la silenton, eksonoris via telefonilo. Vi eliris eksteren por telefoni kaj, reveninte, vi sciigis la novaĵon kiun plej malmulte mi atendis.

Vi devus foriri, ĉar alvokis jam via edzo, troviĝanta ne pli ol cent metrojn de ĉi tie. Mi eksentis tiom da malamo al tiu homo, kiu denove forprenis vin de mi!



## HISTORIOJ PRI SINJORO KOJNO

### (parto 3)

*rakonto de Berto Breĥto \**

#### **Pri la elekto de la bestoj**

Kiam sinjoro Kojno, la pensanto, aŭdis  
Ke la plej fama krimulo de la urbo Novjorko  
Kontrabandisto kaj amasmurdisto  
Estis mortpafita kiel hundo kaj  
Senceremonie entombigita  
Li nenion alian esprimis ol surprizon.  
Kion, li diris, Ĉu estas jam tiel  
Ke eĉ ne la krimulo estas je sia vivo sekura  
Kaj eĉ ne kiu pretas je ĉio  
Havas iom da sukceso?  
Ĉiu scias, ke estas perditaj tiuj  
Kiu zorgas pri sia homa digno.  
Sed tiuj kiuj je ĝi seniĝas?  
Ĉu tio signifas: kiu eskapis la profundaĵon  
Falas sur la altaĵo?  
Nokte dumdorme ŝvitbanite eksaltas la justuloj  
La plej mallaŭta paŝo hororigas ilin  
Ilia bona konscienco persekutas ilin ĝis endormen  
Kaj nun mi aŭdas: ankaŭ la krimulo  
Ne povas plu trankvile dormi?  
Kia konfuzo!  
Kiaj tempoj!  
Kun simpla fiago, mi aŭdas,  
Nenio plu estas farebla.  
Sole per mortigo  
Neniu plu sukcesas.  
Du ĝis tri perfidoj matene:  
Al tio estas preta ĉiu.  
Sed kion valoras preteco  
Se decidas nur kapablo!  
Eĉ senskrupuleco ne sufiĉas:  
Decidas la efiko.  
Tiel eĉ la fifamulo  
Entombiĝas nesensacie.  
Ĉar ekzistas tro da liaspeculoj  
Li ne frapas la atenton.  
Kiom pli malkare li povintus havi la tombon  
Kiu tiom celis la monon!  
Tiom da mortigoj  
Kaj tiom mallonga vivo!  
Tiom da krimoj  
Kaj tiom malmulte da amikoj!  
Se li estintus senrimeda  
Da ili ne povus esti pli malmulte.  
Kiel fronte al tiaj okazoj

Ne perdi la kuraĝon?  
Kion do ni ankoraŭ planu?  
Kiajn krimojn ankoraŭ elpensi?  
Ne estas bone, se estas tro multe  
postulata.  
Tion vidante, diris sinjoro Kojno  
Ni estas senkuraĝigitaj.



#### **Formo kaj materio**

Sinjoro K. kontemplis pentraĵon, kiu donis al iuj  
objektoj tre kaprican formon. Li diris: Okazas al iuj  
artistoj, kiam ili rigardas la mondon, kiel al multaj  
filozofoj. Klopodante pri la formo, la materio perdiĝas.  
Iam mi laboris ĉe ĝardenisto. Li enmanigis al mi  
ĝardentondilon kaj igis min tondi laŭron. La arbo staris  
en potoj kaj estis pruntata por festaĵoj. Pro tio li devis  
havi la formon de globo. Tuj mi komencis pri tondado  
de la sovaĝaj ŝosoj, sed kiom ajn mi klopodis atingi la  
globan formon, longe mi ne sukcesis. Foje mi estis  
troe fortondinta je unu flanko, foje je la alia flanko.  
Kiam fine ĝi fariĝintis globo, la globo estis tre  
malgranda. La ĝardenisto diris seniluziigite: Bone, tie  
la globo, sed kie la laŭro?.

#### **Interparolado**

Ni ne povas plu interparoli, diris sinjoro K. al viro.  
Kial? tiu demandis ektimigite. En via ĉeesto mi estigas  
nenion taŭgan, plendis sinjoro K. Sed tio ja ne ĝenas  
min, konsolis lin la alia. - Tion mi kredas, diris sinjoro  
K. amarigite, sed min tio ĝenas.

#### **Gastamo**

Kiam sinjoro K. gastigis, li lasis sian ĉambron tia,  
kia li trovis ĝin, ĉar li neniom ŝatis, ke iuj markas sian  
ĉirkaŭon per sia personeco. Male li klopodis ŝanĝi sian  
karakteron tiel, ke ĝi konvenu al la loĝejo; kvankam liaj  
planoj ne devis suferi pro tio.

Kiam sinjoro K. gastigis, li movis almenaŭ unu  
seĝon aŭ tablon de ĝia tiama loko al alia, tiel  
respektante sian gaston. Kaj estas pli bone, ke decidu  
mi, kio al li konvenas! diris li.

#### **Kiam sinjoro K. amis homon**

Kion vi faras, estis demandita sinjoro K., kiam vi  
amas homon? Mi faras koncepton de li, diris sinjoro K.  
kaj zorgas ke ambaŭ similiĝu. Ke kio similiĝu? Ĉu la  
koncepto? Ne, diris sinjoro K. la homo.

#### **Pri la perturbo de la nun por la nun**

lun tagon, gaste ĉe iom fremdaj homoj, sinjoro K.



malkovris, ke liaj gastigantoj, sur tableto enangule de la dormoĉambro, videble de la lito, jam estis metintaj la servicon por la matenmanĝo. Pri tio li ankoraŭ pensadis, post kiam li unue en siaj pensoj laŭdintis ilin pro tio, ke ili rapidetis por fini sian laboron kun li. Li meditis, ĉu ankaŭ li pretigus la servicon por la matenmanĝo jam nokte antaŭ la enlitiĝo. Post iom da pensado li trovas tion ĝusta por certaj tempoj. Same ĝuste li trovas, ke ankaŭ aliaj okaze dum kelka tempo okupiĝas pri tiu demando.

### Sukceso

Sinjoro K. vidis preterpasi aktorinon kaj diris: ŝi estas bela. Lia akompananto diris: Antaŭ mallonge ŝi havis sukceson, ĉar ŝi estas bela. Sinjoro K. koleriĝis kaj diris: ŝi estas bela, ĉar ŝi havis sukceson.

### Sinjoro K. kaj la katoj

Sinjoro K. ne amis la katojn. Ili al li ne ŝajnis esti amikoj de la homoj; do ankaŭ li ne estis ilia amiko. Se ni havus samajn interesojn, diris li, tiam mi estus indiferenta al ilia malamika sinteno. Sed sinjoro K. forpelis la katojn nur malvolonte de sia seĝo. Sin kuŝi por ripozo, tio estas laboro, li diris; ĝi devas esti sukcesa. Ankaŭ kiam la katoj miaŭis antaŭ lia pordo, li levigis de sia kuŝejo, eĉ dum malvarmo, kaj enlasis ilin en la varmon. Ilia kalkulo estas simpla, li diris, se ili vokas, oni malfermas al ili. Se oni al ili ne plu malfermas, ili ne plu vokos. Voki, tio estas progreso.

### La besto de sinjoro K. favorata

Kiam sinjoro K. estis demandita, kiun beston li ŝatas antaŭ ĉiuj, li nomis la elefanton kaj tion klarigis tiele: La elefanto kunigas ruzon kun forto. Tio ne estas la mizera ruzo, kiu sufiĉas por eliĝi el insido aŭ por atingi manĝaĵon neatentite, sed la ruzo, kiu disponas pri la forto por grandaj entreprenoj. Kie estis tiu besto, tien kondukas larĝa spuro. Tamen ĝi estas bonnatura, komprenas ŝercon. Ĝi estas bona amiko, kiel ĝi estas bona malamiko. Tre granda kaj peza, ĝi estas tamen ankaŭ rapida. Ĝia rostron kondukas al enorma korpo ankaŭ la plej malgrandajn manĝaĵojn, ankaŭ nuksojn. Ĝiaj oreloj estas adapteblaj: Ĝi aŭdas nur, kio al ĝi konvenas. Ĝi atingas ankaŭ grandan aĝon. Ĝi estas ankaŭ sociema, kaj tio ne nur kun elefantoj. Ĉie ĝi estas ŝatata kaj timata. Certa komiko ebligas, ke ĝi povas eĉ esti honorata. Ĝi havas dikan haŭton, en ĝi disrompiĝas la tranĉiloj; sed ĝia animo estas tenera. Ĝi povas malĝojiĝi. Ĝi povas koleriĝi. Ĝi ŝatas danci. Ĝi mortas en densejo. Ĝi amas infanojn kaj aliajn malgrandajn animalojn. Ĝi estas griza kaj frapas la atenton nur per sia maso. Ĝi ne estas manĝebla. Ĝi

scias bone labori. Ĝi ŝatas trinki kaj ĝojiĝas. Ĝi faras ion por la arto: ĝi liveras eburon.

### La antikva epoko

Antaŭ konstruktiveca pentraĵo de la pentristo Lundström, bildiganta kelkajn akvuojn, sinjoro K. diris: Bildo el la antikva epoko, el barbara tempo! Tiam la homoj ja certe nenion plu distingis, la rondo ne plu ŝajnis ronda, la pinto ne plu pinta. La pentristoj devis ĉion reĝustigi kaj montri al la klientoj ion certan, unusencan, fikse formitan; ili vidis tiom da necerta, flua, duba; ili tiom malsatis je nekorupteco, ke ili jam aljubilis homon, kiu ne vendis sian stultaĵon. La laboro estis dispartigita inter multaj, tio videblas en tiu bildo. Tiuj, kiuj decidis pri la formo, ne zorgis pri la destino de la aĵoj; el tiu ĉi ujo oni ne povas verŝi akvon. Tiam certe multaj homoj estis rigardataj kiel uzaĵoj. Ankaŭ kontraŭ tio la artistoj devis defendi sin. Tempo barbara, la antikva epoko! Oni atentigis sinjoron K., ke la bildo devenas el la nuntempo. Jes, diris sinjoro K. malĝoje, el la antikva epoko.

### Bona respondo

Laboristo antaŭ tribunalo estis demandita, ĉu li volas uzi la laikan aŭ la eklezian formon de la ĵuro. Li respondis: Mi estas senlabora. - Tio estis ne nur distriĉo, diris sinjoro K. Per tiu respondo li sciigis, ke li troviĝas en situacio, kie tiaj demandoj, ja eble eĉ la tuta proceso mem, ne plu havas sence.

### La laŭdo

Kiam sinjoro K. aŭdis, ke li estis laŭdata de lernintoj, li diris: Post kiam la lernintoj jam antaŭ delonge forgesis la erarojn de sia majstro, li mem ankoraŭ daŭre memoras pri ili.

### Du urboj


Sinjoro K. preferis la urbon B al la urbo A. En la urbo A, li diris, oni amas min; sed en la urbo B oni estis al mi afabla. En la urbo A oni estis al mi utila; sed en la urbo B oni bezonis min. En la urbo A oni petis min al la tablo, sed en la urbo B oni petis min en la kuirejon.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO**

el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la  
tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kojno.html>






La simpla korta hund', Barbos laŭ nom',  
 Gardisto kun fervor' de la sinjora dom',  
 Rigardis foje la fenestran breton  
 Kaj vidis li Ĵuĵu'-hundeton  
 Kuŝantan sur kusen' kun plaĉa delikat'.  
 Ĉar estis li amik', malnova kamarad',  
 Barboso-hund' tre ĝojas kaj ekzaltas,  
 Al la fenestra bret' alvenas kun kares',  
 Kun vigla vosta sving' ĝemetas li sen ĉes',  
 Kaj gaje saltas.

"Nu, kiel vi, Ĵuĵu', feliĉas en fortun',  
 Post kiam la sinjor' vin prenis kaj kompatis?  
 Ja iam en la kort' ni ofte tre malsatis,  
 Kaj kiel al sinjor' vi servas nun?"  
 "Ne plendas mi pri sort' ", hundet' Ĵuĵu' eldiras:  
 "Sinjoro kun ador' min ŝatas kaj admiras.  
 Mi vivas en feliĉ'  
 En ĝuo kaj en riĉ',  
 Amuzas en divers', kaj por ripoz' bonvola  
 Libere kuŝas mi sur la tapiŝo mola.  
 Kaj kiel vi?" — "Mi," diris hund' Barbos'  
 Kun vido de malĝoj' kaj mallevita vost':  
 "Mi vivas laŭ malnov'; suferas pro malsato  
 Kaj pro malvarma stato.  
 La domon de sinjor' mi gardas kun fidel',  
 Dum pluvo kaj dum neĝ' estante sub ĉiel'.

Kaj se en bojo mi eraras,  
 Por mi punbato ordinaras.  
 Sed kiel vi, Ĵuĵu', alvenis al feliĉ'?  
 Malforta estas vi, statur' en malsufiĉ'...  
 Ja, malgraŭ mia fort', mi penas sen rezulto.  
 Sed kiel via serv'?" — "La serv'? Ne estas multo,"  
 Ĵuĵu' respondis kun malŝat':  
 "Sur du piedoj marŝ-irad'."  
 Tre multaj en la viv' feliĉon sian trovas,  
 Ĉar sur piedoj du marŝadi ili povas.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
 Ukrainio



7 >> ekzemplo pri tio estas la blanka ĝiba baleno nomita Migaloo vidita en la aŭstraliaj marakvoj.

Ni revenu al la filmo: Herman Melville, kiu laŭdire legis multajn verkojn kaj sonetojn de Ŝekspiro, alportis la atmosferon de tragedio al la romano kaj pretigis ĉi tiun malamegon, pasion kaj la lukton en la sala akvo de oceano. Ankaŭ same estas John Huston. Kvazaŭ estas du mesaĝistoj, kiuj antaŭinformas nin pri tio, kio okazos en la filmo. Unu el ili estas pastro Marple (Orson Welles) kaj la alia estas Elijah. En la komencaj scenoj ni vidas la muron de la preĝejo ornamita per platoj je memoro de la mortintaj maristoj. Sur la katedro, en la formo de ferdeko, pastro Marple laŭtlegas tekstojn el la Malnova Testamento pri Jona kaj avertas la preĝantoj. En alia sceno, kie Iŝmael (la rakontanto de eventoj kaj kvazaŭ la unu-homa ĥoro) kaj la indiĝena Queequeg pluiras al la ŝipo, Elija haltigas ilin. Li eldiras mallumajn aferojn, kiuj montras al okazontaj aferoj. Fakte li estas la heroldo, la profeto Elija, kies prapatroj estis orakoloj.

La filmo estas impona. Sed el mia hodiaŭa perspektivo, Gregory Peck kaj Orson Welles, kiu ludis tre mallongajn rolojn, ŝajnas al mi troigaj. Mi vere pensis, ke la aktoro kiu rolis kiel Queequeg estis vere indiĝeno. Mi surpriziĝis vidante la liston de roluloj ĉe la

IMDB retejo. Aŭstra aktoro Friedrich von Ledebur ludis ĉi tiun karakteron.

En 1998 kaj 2011, la libro estis farita ankaŭ kiel televidserioj. Fakte estas du Moby Dick kino filmoj faritaj en 1930 kaj 1978, kaj ankaŭ en 2010 iu alia longdaŭra filmo. Mi spektis neniun el ili sed mi spektos. Tamen tiu filmo, kiu impresis min estas tiu de Huston.

La romano, sendube, estas tiel vasta, multtavola kaj malfermita al interpretado, tiel, kiel la oceanoj enhavantaj Moby Dick kaj Mocha Dick. Kinoarto ne havas la profundecon de literaturo. Se vi spektis la filmon, vi legos la romanon; se vi legis la romanon kaj ne spektis la filmon, vi faros la kontraŭon. Se vi faris neniun, eble vi faros ĝin post ĉi tiu teksto. Se vi faris ambaŭ, eble iam vi rakontos al mi multe pli malsamajn aferojn.

Prenu ĝin sufiĉe serioze por ke vi timu la marojn, sed ne restu sufiĉe for de ĝi por ke via timo ne estu obseda! La maro estas la vivo mem

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**,  
 Turkujo – Büyükkada (iu ajn insulo sur la tero)  
 25 junio 2019



## DUA PARTO - LA VIVO



59

**Ĉe la gvidado de la homoj kaj ĉe l' servo al la ĉielo**

**ne estas io pli bona ol limigo.**

**Ĉar nur per limigo oni frutempe povas trakti la aĵojn.**

**Per la frutempa traktado de l' aĵoj oni kolektas duoble la fortojn de l' VIVO.**

**Per tiuj duobligitaj fortoj de l' VIVO oni povas majstri ĉiun situacion.**

**Se oni povas majstri ĉiun situacion, neniu konas niajn limojn.**

**Se neniu konas niajn limojn, ni povas posedi la mondon.**

**Se oni posedas la patrinon de l' mondo oni gajnas eternan daŭradon.**

**Jen la SENCO de l' profunda radiko, de la firma grundo;**

**de la terena estado**

**kaj de l' daŭranta rigardado.**

### Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo: „ni povas posedi la mondon.“

En la originalo la vorto „ĝuo“(fonetike) ne signifas „mondon“, sed „regon“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Kun la senmezura potenco oni povas regi regnon.“

Jen la SENCO de l' profunda radiko,“

En la originala teksto la „dao (fonetike)“ ne signifas „SENCO“, sed „metodo, rimedo, maniero.“

Ĉi tie ne temas pri „SENCO“. Laŭ mi la traduko de Wang Chongfang estas pli fidela al la originalo. Jen:

„Tio estas nomata „la profunda kaj firma plantado de la radikoj, — Jen la maniero ĝui longan vivon kaj atingi eternan ekzistadon.“

### Rimarkoj de Cezar

La ĉapitro komenciĝas per tondra frapfrazo. La plej bona regado laŭ li estas limigita regado. Se oni pensas tion plu, estas neniu regado eble eĉ „la plej plej bona“ regado.

Wang Chongfang uzas por la vorto „limigo“ la vorton „avaro“. Jen lia klarigo, kial li faras tion: „La ĉefa ideo de tiu ĉi ĉapitro estas la principo de „avareco“. Tiu ĉi principo proponita de Laŭzi al la regantoj havas du signifojn: unue, uzi kiel eble modere materialojn kaj konservi ŝparitaĵojn; due, akumuli moralan forton aŭ la Virton.

Por bone fari la regadon de la homoj kaj la servadon al la Ĉielo, la regantoj devus sekvi la principon de „avareco“, nome: domaĝi kaj ŝpareme uzi homfortojn kaj la materialojn de la popolo unuflanke kaj bridi siajn dezirojn je ekscesaj plezuroj aliflanke. Laŭ Laŭzi, se la regantoj tenus sin je la principo, ili povus ne nur triumfe venki ĉiajn obstaklojn, sed ankaŭ longedaŭrigi sian suverenecon. Ĉi-rilate oni ja povas diri, ke la principo de „avareco“ konkretigas la Taŭon de Laŭzi kaj ankaŭ lian principon de „senagado“.

(daŭrigota)

## Ĉu eksterteruloj ne zorgas homaron?

**P**ensante la Fermi-paradokson, kiu simple klarigite estas la ŝajna kontraŭaĵo inter la aĝo kaj vasteco de la universo kaj la manko de evidenteco pri eksterteruloj, tuja penso estas, ke ni ne vidas eksterterulojn ĉar ili neniam vojaĝas al Tero. Eksterteruloj havas aĵojn pli interesajn por fari ol viziti nian enuigan planedon.



La ofta analogeco estas tio, ke homaro estus kiel formikoj kompare de ili. Ni estus same pli stultaj kaj

## verkis Jason Mey el Usono


seninteresaj. Oni ne zorgas la agojn kaj vivojn de formikoj, do kial ili zorgus nin?

Sed tiu ekzemplo ignoras gravan punkton. Estas homoj, kiuj studas formikojn profesie. Estas homoj, kiuj havas formikojn kiel dombestoj.

Kvankam la plejmulto el homaro ne zorgas formikojn, iom zorgas ilin. Certe estus kelkaj scivolemaj eksterteruloj kiuj zorgus homaron.

Eble jes, homaro estas kiel formikoj kompare de eksterteruloj. Sed krom se ĉiu el la eksterteruloj pensus same, iom ja zorgus pri ni. Kaj se eksterteruloj estus oftaj kaj vojaĝus inter la steloj, iom vizitus certe Teron por esplori la planedon kaj homaron.

verkis **Jason Mey** el Usono



Fonto: el la blogo Pri lo Ajn - Blogo de variaj temoj <https://priioajn.wordpress.com/2019/05/27/cu-eksterteruloj-ne-zorgas-homaron/>

## LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Ŝi malŝaltis la gramofonon, ekbruligis cigaredon, preskaŭ tuj forĵetis ĝin, kaj abrupte ordonis: "Helpu min!"

Senvorte ili ordigis la ĉambron, kolektis la cigaredstumpojn, la malplenajn glasojn.

Lulu malfermis la ŝutrojn, avida enspiris la freŝan aeron, kiu suprenvenis el la keloj. "Kia varmego!... ĉu ne?"

La maljuna virino nenion respondis, deturnis la okulojn kun ia sovaĝa pudoro.

Lulu sidiĝis sur la fenestrobretton, dolĉe ekbalanciĝis kaj kantetis. Ŝi aspektis malebriiĝinta, malsana; ŝiaj palaj vangoj aperis kvazaŭ lividaj makulegoj sub la pudro, kiun la kisoj estis forviŝintaj. Ŝiaj larĝaj, profundaj, malplenaj kaj bluringaj okuloj rigardis rekte antaŭen.

"Kio okazas al vi, Njanja? Ĉiunokte estas same", ŝi fine diris per kvieta voĉo raŭkiĝinta pro la vino kaj fumo. "Kaj en Odeso, Dio mia!... sur la ŝipo!... Ĉu vi neniam rimarkis ion?"

"Kia honto!" flustris la maljunulino kun esprimo de abomeno kaj sufero. "Kia honto!... dum viaj gepatroj dormas proksime!..."

"Nu! Kio do?... Ha! ĉu vi freneziĝas, Njanja? Nenion malbonan ni faras! Oni nur iom drinkas, oni kisas unu la alian; kio estas malbona?... Ĉu vi ne opinias, ke niaj gepatroj same agis dum sia junaĝo? "

"Ne, filino mia !"

"Ha! Ĉu vere vi tiel opinias?"

"Ankaŭ mi estis iam juna, Luliĉka. Jam antaŭ longe... sed mi bone memoras pri la juna sango brulanta en miaj vejnoj. Ĉu vi kredas tion forgesinda? Kaj mi memoras viajn onklojn kiam ili aĝis dudek jarojn, kiel vi. Tio estis en Karinovka, kaj la printempo ... ha! kian veteron ni havis tiun jaron!... Ĉiutage kun promenadoj en la arbaro kaj sur la lageto... Kaj vespere, baloj ĉe la najbaroj aŭ en nia domo... Ĉiu fraŭlino havis sian amanton, kaj ofte ili ĉiuj forveturis, en la lunlumo, per triĉevala glitveturilego..."

Via forpasinta avino diris : " En nia tempo..." Sed kio? Ili bone sciis, ke estas aferoj permesataj kaj aliaj malpermesataj...

Foje, matene, ili venis en mian ĉambron por rakonti, kion diris tiu aŭ alia ulo...

lun tagon, ili fianciĝis, ili edziniĝis. Ili vivis kun sia parto da mizero kaj sia parto da feliĉo, ĝis kiam Dio ilin reprenos... Ili mortis ankoraŭ junaj, sciis ; unu pro sia akuŝo kaj la alia pro forta febro... Nu, jes, mi memoras...

Ni havis la plej belajn ĉevalojn en la regiono, kaj ili are rajdis en la arbaro... foje via patro, kiu estis tiam junulo, kun liaj amikoj, kaj viaj onkloj kun aliaj junulinoj, kaj la lakeoj, kiuj portis la torĉojn antaŭ ili... "

"Jes", maldolĉe diris Lulu, montrante la tristan malluman saloneton, kaj la aĉan vodkon en la fundo de la glaso, kiun ŝi senkonscie turnis inter siaj fingroj, "kompreneble la dekoro ŝanĝiĝis..."

"Ne nur tio ŝanĝiĝis", grumbliis la maljunulino. Ŝi malgaje rigardis Lulun.

"Filino mia, pardonu min... vi ne bezonas honti, mi vidis vin naskiĝi... Nu, vi almenaŭ ne pekis, ĉu?... Vi daŭre estas virgulino?"

"Nu, jes, oldulino mia!", diris Lulu. Ŝi memoris iun nokton de bombado en Odeso, kiam ŝi restis en la domo de l' barono Rozenkranz\*, la eksa guberniestro de la urbo. Li estis en malliberejo, kaj lia filo loĝis sola tie.

La kanonado ekis tiel abrupte, ke ŝi ne havis tempon por reiri hejmen, tial ŝi pasigis la nokton en la senhoma palaco, kun Sergio Rozenkranz.

Kio okazis pri tiu ulo? Verŝajne mortinta... Tifo, malsatego, mistrafa kuglo, malliberejo... vere, nur sufiĉis elekti...

Kia nokto!... La dokoj brulis... De la lito, kie ili karesis unu la alian, ili vidis la flamantajn petroltavolojn disflui sur la haveno...

Ŝi memoris tiun domon, sur la kontraŭa flanko de la strato, kun ties disfalta fasado kaj la kurtenoj el tulo, kiuj balanciĝis en la malpleno...


Tiun nokton... la morto estis tiel proksima...

Ŝi senkonscie rediris:

"Jes, Njanjuŝka..."

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio





Trilas ie birdino -  
Jam malordas la kor'  
Kaj Venuso alvenas  
Kun la flora dekor'.

Kaj Venuso alvenas  
Kun la flora dekor',  
Trilas ie birdino -  
Jam malordas la kor'.

\*\*\*

Kun floretoj ekfloras  
Inter ni bela am'  
Pasintecan sonoron  
Mi ne aŭdas plu jam.

Pasintecan sonoron  
Mi ne aŭdas plu jam.  
Kun floretoj ekfloras  
Inter ni bela am'.

\*\*\*

Per la blanktrifolioj  
Kaj la verdtimian'  
Vian bruston tenere  
Mi ornamos sen van'.

Vian bruston tenere  
Mi ornamos sen van'  
Per la blanktrifolioj  
Kaj la verdtimian'.

\*\*\*

Ĉarma bluhepatiko,  
Estu mia, aŭ ne.  
Vortoj ĝenas la amon -  
Ĉiuj konas, ho ve!

Vortoj ĝenas la amon -  
Ĉiuj konas, ho ve!  
Ĉarma bluhepatiko,  
Estu mia, aŭ ne.

\*\*\*

Mi kun lipoj ĉe lipoj  
Povus vivi ĝis mort'.  
Min timigas nenio,  
Eĉ funebra la fort'.

Min timigas nenio,  
Eĉ funebra la fort',  
Mi kun lipoj ĉe lipoj  
Povus vivi ĝis mort'.

\*\*\*

Kreskas nia dometo,  
Streĉas sin ĝis ĉiel',  
En dometo feliĉo  
Dolĉas kvazaŭ miel'.

En dometo feliĉo  
Dolĉas kvazaŭ miel',  
Kreskas nia dometo,  
Streĉas sin al ĉiel'.

\*\*\*

tradukis **Antanas VAITKEVIČIUS** el Litovio  
sendis **Povilas Jegorovas** el Litovio

1933-03-06

## Forgesemo

de Carlo Manzoni el Italio

**S**injoro Veneranda haltigas surstrate piediranton.  
„Pardonu“, li alparolis tiun, „ĉu vi ne forgesis ion?“

„Ĉu mi? Kial?“ demandis la sinjoro mire.



„Nature, vi“, respondis Veneranda.

„Mi forgesis nenion“, diris la piediranto kaj kun mirego rigardis sinjoron Venerandan.

„Ĉu vi estas certa?“

„Tute. Sed entute, kiel vi ekhavis la ideon demandi, ĉu mi forgesis ion, eĉ, se vi ne konas min?“

„Kial?“ kontraŭdiris sinjoro Veneranda. „Ĉu devas koni min ĉiu, kiu ion forgesas? Certe ekzistas homo, kiu tute ne konas min kaj tamen forgesas multe. Ĉu vi ne samopinias?“

„Nature“, konsentis la sinjoro, „sed mi forgesis nenion.“

„Bonege“, diris sinjoro Veneranda. „Vi devas rekoni, ke mi ne povis scii tion ĝuste tial, ĉar mi ne konas vin.“

„Vi ne konas min kaj tamen ne hontas alparoli min sur la strato kaj paroli malsaĝaĵojn“, kriis kolere la sinjoro.

„Sed mi ne devas koni ĉiun en la urbo“, diris sinjoro Veneranda. „Eble ne estas mia kulpo, ke mi ne konas ĝuste vin, vin, vin...! Mi vidas vin unuafoje kaj vi supozas tuj, ke mi devus koni vin.“

„Tute ne“, retiriĝis la sinjoro.

„Tute ne, tute ne...“ imitis lin Veneranda. „Vi nur ŝtelas la tempon de la homoj.“ Kaj li turnis sin kaj foriris.

tradukis *I. Takács*

skanis *Hans-Georg Kaiser*

Fonto: *el Juna Amiko 85/2 - skeĉo-traduko de I. Takács*


<https://cezarkulturo.blogspot.com/2018/11/carlo-manzoni-forgesemo-skeco-traduko.html>



## Stranga ponto

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

**L**a juĝisto Francisco estis atinginta sian maljunecon post longa kariero dum kiu longa procesio da ŝtelistoj, murdistoj, trompistoj, fiuloj k.t.p. aperis antaŭ li por esti juĝataj laŭleĝe, kaj ĉiam li verdiktis senerare pri ilia kulpeco aŭ malkulpeco.



Fakte, oni kromnomis lin "Salomono" ene de la juĝejo pro liaj senpartiecaj kaj neŭtralaj decidoj, kiuj ĉiam malsubakvigis la veron. Tamen, ĉi-foje, la kazo estis tre malfacila kaj Francisco unuafoje en sia vivo ne certis, ĉu li kondamnu aŭ absolvu la akuziton, kaj aŭskultante la akuzanton li perplekse karesadis al si la barbon.

"Nia urbo, S-ro juĝisto, estas kreita en la buŝoj de du ranoj, kaj la akuzito sciis tion, kvankam li ŝajnigas,


ke li ne estis konscia pri tio".

"Jes jes neniu diris tion al mi!" kriis la akuzito.

"Bonvolu lasi la akuzantan advokaton paroli, poste vi rajtos defendi vin mem!" diris Francisco.

"Dankon, S-ro juĝisto! Kaj tiu ponto? oni simple ne devis konstrui ĝin! Ĝi estas tre danĝera! Kio okazus ekzemple, se iu muŝo flugus proksime al la du gigantaj ranoj? Mi diros al vi: ili instinkte saltus por kapti kaj manĝi ĝin! kaj la rapida movo de la salto faligus la ponton kaj sekve ĉiujn aŭtojn kaj veturilojn kiuj tiumomente malbonŝance troviĝas sur ĝi! Imagu la katastrofon! Imagu kiom da mortintoj tio kaŭzus! Jes, sed la akuzito, kiu, ni memoru tion, estas la estro de la kompanio kiu starigis la ponton, ne zorgas pri tio! Lin nur interesas kiel elspezi la milionojn kiujn li gajnis konstruante la ponton! Tial, s-ro juĝisto, mi postulas la plej grandan, severan, senindulgencon por la akuzito! Tio estu la admono por tiuj kiuj vunde emas malutili al nia socio! kaj mi postulas la ĝismortan prizonon ankaŭ por la urbestro, kiu donis la permeson fari tiun malbenitan pontaĉon! Dankon S-ro juĝisto! mi havas nenion plu por diri ".....

sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio



## Blogo de vilaĝa kuracisto

-- el la blaga blogo

**K**iel kuracisto en malgranda vilaĝo dum pli ol dudek jaroj mi spertis amason da kuriozaĵoj. La plej proksima hospitalo estis en sufiĉe



malproksima granda urbo, do tute ne konvenis sendi vilaĝanojn al la specialisto pro malgravaj aferoj. Tiamaniere mi neoficiale spertiĝis pri multaj medicinaj branĉoj: mi agis kiel

traŭmatologo, pediatro, gerontologo, ginekologo, seksologo, psikologo, kaj eĉ konfesprenanto — kiam multaj homoj jam ne multe vizitis la preĝejon. Kompreneble, mi ne povis solvi la plej gravajn malsanojn de tiuj specialaĵoj, sed mi ja elturniĝis pri la plej kutimaj negravaj misfunkcioj.

Malgraŭ ke mi forte fidis je la scienca metodo, ni kuracistoj ĉiam sciis, ke sanigo ne estas nur kemia reakcio al piloloj. Fine, homaj estaĵoj estas pli ol provotubo, ĉu ne? Pro tio, sen forgesi la farmakologian

helpon, mi ĉiam atentis ankaŭ la animon de la pacientoj. Aŭskulti ilin estas la unua tasko de konscia kuracisto kaj kiel eble kuraci ankaŭ la animon estas nia rolo en la landa saniga sistemo. Tio ŝajnas pli temporaba, sed finfine estas investo: ju pli oni klopodas sanigi samtempe kaj la korpon kaj la animon, des malpli ili ree malsaniĝas.

Tamen, ne ĉiam tio funkcias kiel mi antaŭpensis. En la vilaĝo loĝis tri maljunaj fraŭlaj fratinoj, kiuj tiom ŝatis mian atenteman "sistemon", ke ili tri ĉiutage —jes, ĉiutage— vizitis min. Ĉar ilia sano estis sufiĉe bona, ili permesis, ke mi atentu pli urĝajn kazojn antaŭ ili. Fakte, ili havis nenian farendaĵon ĝis la tagmanĝo, do kutime ili pasigis la matenon en la atendejo. Ne necesas diri, ke tiu loko estis unu el la plej gravaj el la vilaĝo en konkurenco nur kun la kafejo. Do, kiam estis ilia vico, la tri fratinoj eniris mian oficejon kaj paroladis. Kutime temis pri duboj, ekzemple: "ĉu estas normala afero, ke mi sentas iom da doloro en miaj kruroj f i n e d e l a tago?" kaj mia respondo estis kutime laŭ la sokrata metodo: "kara, kiom aĝa vi estas?" kaj ŝi



>>12

## Finna kuirarto \*

**T**io, kion oni manĝas en iu lando dependas de la klimato kaj grundo/humo. Klimate Finnlando estas dividita en 8 kreskozonojn. La zonoj 1-2 situas sude kaj estas la plej favoraj por agrikulturo. La zono 8 situas en Laponio. Tie la kreskosezono - somero - estas plej mallonga sed ankaŭ la plej luma. La vintroj tie estas multe pli severaj ol en la zonoj 1-2, kaj tial oni devas zorgeme elekti, kiujn speciojn tie kultivi.

Niaj nutraĵoj konsistas el varmo, lumo, akvo kaj humo. La tavolo de humo en Finnlando ne estas dika kaj enhavas malmultan kalkon. Ofte la agroj estas argilecaj, ŝtonozaj, sablozaj, la humo acida, ne tre fertila. La kultivisto devas scii kiel kultivi sian terpecon. La du-kilometrojn dika glacitavolo antaŭ pli ol dekmil jaroj kvazaŭ forskrapis nian humon kaj portis ĝin al pli sudaj, pli bonŝancaj landoj, kiel Hungario, kie mi en Muzeo pri terkultivado vidis radikojn de arbo en dikega humotavolo. Ĝi ŝajne dikis 1 metron! Mirakle por mi. Ĉe ni la humo dikas 15 - 30 cm.




Antaŭ miloj da jaroj niaj prapatroj komencis ŝanĝi arbaron en kultiveblan agron, ofte nur duonhektaron aŭ unu hektaron en du jaroj. Ili somere faligis la arbojn, lasis la trunkojn sekigi ĝis la sekva jaro, provis kovri la bruligotan terenon per tavolo de branĉoj kaj trunkopecoj. En la cindron ili semis sekalon, hordeon, fagopiron, rapojn, linon. Anstataŭ terpomojn oni manĝis rapojn ĝis la 18a jarcento. En kelkaj jaroj la cindro perdis sian fertilecon kaj oni devis ekkultivi aliloke. Niaj prapatroj fariĝis spertuloj pri tiu ĉi maniero ŝanĝi arbaron en agron. Eĉ la sveda reĝo petis finnojn veni kaj ebligi terkultivadon en la grandegaj, timigaj svedaj arbaroj.

Dum la tempopaso la brulkultivado estis malpermesata, unue en okcidenta Finnlando, multe poste en la orienta. Oni jam komencis timi la malpliigon de la arbaro. Terpomo anstataŭis rapojn en

## verkis kaj sendis Raita Pyhälä el Finnlando

la fino de la 18a jarcento. Al la cerealoj aldoniĝis aveno kaj tritiko. Nuntempe aveno estas tre aprezata kaj oni elpensas novajn manierojn uzi ĝin, ne nur por kaĉo kaj pano, sed ankaŭ por anstataŭigi viandon.



En la naturo oni ĉiam trovis helpon kontraŭ malsato. Kiam malsukcesis rikoltoj de sekalo kaj aliaj cerealoj, oni ekuzis pinan ŝelon, radikojn de kelkaj plantoj por miksi kun la nesufiĉa cereala rikolto. Pli bongustaj kaj pli facile digesteblaj certe estas niaj beroj: mirtelo, vakcinio, oksikoko, kamemoro. Oni frande manĝis ankaŭ sovaĝajn frambojn kaj malgrandajn fragetojn, kiujn oni ne plu trovas abunde, pro la ŝanĝoj en la agrikulturo kaj paŝtado. Empetrojn oni ne multe uzis en Finnlando. Nigraj rubusoj ne kreskas en nia naturo. Nun ni havas importitajn fruktojn, sed en mia junaĝo mi ne sciis, kiel senŝeligi oranĝon aŭ manĝi bananon, ĉar tiajn mi vidis nur longe post la dua mondmilito.

Fungojn oni sciis uzi en orienta Finnlando; en la okcidenta parto de nia lando oni lernis uzi ilin, kiam kareliaj evakuitoj estis translokigitaj okcidenten. Ni faras fungosalatojn el batita kremo, cepoj kaj salitaj laktarioj, ni faras diversajn fungosaŭcojn, niaj boletoj estas eksportataj al Italio, ni havas plurajn speciojn de kantareloj, ni sekigas fungojn por vintro. Kiu ajn rajtas kolekti berojn kaj fungojn ĉie, sed oni devas lerni por ne veneni sin kaj siajn familianojn per mortigaj specoj. Unu el la plej perfidaj kaj danĝeraj fungoj estas la blanka amanito.

Ĉasado kaj fiŝkaptado nuntempe estas multekostaj hobiaj, sed antaŭe ĉiu familio en la kamparo kompletigis sian nutriĝon per leporoj kaj galinofarmaj birdegoj. Aŭtune ankaŭ nun okazas ĉasado de anasoj, tuj kiam la malpermeso ĉesas. Alko estas alia besto, kiun oni ĉasadas kaj aprezas. La viandon oni donas al geamikoj, parencoj, frostigas por si mem. En kelkaj vilaĝoj estas kutimo inviti ĉiujn vilaĝanojn al senpaga alkosupo, kiu enhavas terpomojn, cepojn, karotojn kaj alkajon. Se oni ne ĉasus alkojn, ili pliiĝus kaj kaŭzus pli kaj pli da trafikakcidentoj. Alkoj ne timas aŭtojn.

Boacoj ne estas sovaĝaj bestoj, nur duonsovaĝaj. Ĉiun boacon posedas iu homo, supozeble sameo, kaj estus krimo ĉasi aŭ pafi boacon. Lapon-devena franda plado estas boacaĵo fritita el tre maldikaj frostigitaj tranĉaĵetoj. En la fora pasinteco la urso estis la reĝo de la arbaro, oni ne kuraĝis eĉ mencii lian nomon sed uzis kaŝnomojn. La urso venis sur la teron el la ĉielo, lasis kapti sin, nutris sian popolon, kaj la ostojn la manĝintoj zorgeme kunmetis por sendi la urson en la

ĉielon. La ĉasistoj pardonpetis al la urso, ke pro sia malsatego ili devis mortigi lin.



La finna kuirarto antaŭ la fino de la 20a jarcento estis preskaŭ unueca. Ĝi baziĝis sur terpomo, sekala pano, kaĉoj sekala, hordea, avena, porkaĵoj salitaj kaj fumaĵitaj, cepoj, brasiko, laktaĵoj, ovaĵoj, beroj kaj fungoj. Nialandaj cerealoj enhavas glutenon, kaj antaŭ nelonge oni komprenis, ke kelkaj homoj suferas de celiakio kaj mortas se ili uzas niajn kutimajn cerealojn. Ili bezonas rizon, maizon kaj aliajn eksterlandajn. En mia infanaĝo oni povis havi rizokaĉon kun lakto, cinamo kaj sukero nur kiel festopladon, precipe en la kristnaska sezono. Oni kultivas fragojn, frambojn, ribojn ruĝajn kaj nigrajn, pomojn, en la zonoj 1-2 ankaŭ pirojn kaj prunojn. Konservado ne estis facila, precipe kiam mankis sukero. Nun nin helpas frostigiloj. De longe brasikoj, florbrasikoj, cepoj, pizoj, tomatoj estas konataj. Kiel terfruktojn (radikfruktojn) oni kultivas napojn, karotojn, ruĝajn betojn, rafanetojn. Kukumojn oni salas aŭ konservas per vinagro kaj sukero aŭtune. Malpli konataj estis celerioj, poreoj, sed nun oni kultivas kaj uzas ilin. Aperis sur la bretoj de la vendejoj ekzemple kukurboj, kukurbetoj, kiaj squash, zucchini. Ili eĉ ne havas finnajn nomojn, oni nomas ilin kesäkurpitsa (someraj kukurboj). Ankaŭ fazeoloj estis malfacile kultiveblaj pro la manko da varmo kaj pro la danĝero de noktaj frostoj, sed nia klimato jam iom mildiĝis kaj homoj lernas kultivi kaj kuiru novajn plantojn.

La spicoj, kiujn mi en junaĝo konis, estas salo, juniperaj "beroj", sukero, cinamo, vanilo, kariofilo, zingibro, pipro, kaj spicoherboj aneto, petroselo, ŝenoprazo. Karvion oni uzis por spici sekalan panon. Nun estas konataj ankaŭ koriandro, levistiko, safrano, anizo, muskato ( ne pensu ke tio estas besto "muskato"! ). El Azio venis vasabi, soja saŭco, terijaki, kuirita zingibro kaj aliaj ekzotaĵoj, ne paroli pri ĉieaj keĉupo kaj mustardo. Aperis en niaj urboj restoracioj ofte fonditaj de enmigrinto. En ili oni kuiras laŭ la

kutimo de la enmigrintoj. Verdire estas malfacile trovi FINNAN restoracion.

Finnoj ŝatas elektrajn fornojn. Gason oni uzas en somerdomoj en lokoj, kie elektro ne estas havebla, ekzemple en iu insulo aŭ fora sovaĝejo. En mia junaĝo ĉiuj kamparanoj kuiris per fornojn, kie oni bruligis lignerojn, branĉojn. Antaŭ 200-300 jaroj en okcidenta Finnlando oni kuiris en potoj pendantaj aŭ starantaj super la fajro en senporda fajrejo, dum en orienta Finnlando oni kuiris en grandaj fornoj. La pano kaj okcidente kaj oriente estis ĉefe el sekalo, sed en la okcidento oni bakis pli malofte kaj la panoj havis truon meze, por ke oni povu meti ilin sur stangon ĉe la plafono. Tie la pano malmoliĝis de tago al tago, de semajno al monato. Gemaljunuloj devis raboti por si maldikajn tranĉaĵojn aŭ oni trempis la panon en akvo aŭ lakto por remoligi ĝin.. En la oriento, provincoj Savonio kaj Karelio, oni bakis pli ofte, kaj la panoj plej ofte dikis kaj molis, estis pli facile manĝeblaj. Hordeaj panoj povis esti dikaj, molaj, aŭ maldikaj "patkukoj". Famaj estas la savoniaj "kokoĵ", napokoko, terpomokoko, fiŝkoko . Ili aspektas kiel panoj sed ene estas lardo aŭ graso porkaĵo, fiŝoj (precipe perkoj, koregonoj),terfruktoj. Tiajn "kokoĵn" oni bakas dum horoj aŭ tra la nokto, tiel ke eĉ la plej ostetplenaj fiŝoj tute moliĝas. Ni malfermas la rondan pinton kaj elfosas la farĉon. En Laponio oni faris platajn maldikajn patkuk-formajn panojn el hordeo kaj tritiko. Unue oni supozeble bakis ilin sur varmegaj ŝtonoj apud fajro. En la insularo la loĝantoj kutimiĝis al dolĉigita pano. Tien la modeloj venis de Svedio.

Ni havas fiŝojn el lagoj, riveroj, maro. Ni havas ne nur mil lagojn sed cent dudekmil. Trutoj kaj salmoj kaptiĝas en riveroj. Marajn fiŝojn pli bone konas loĝantoj de la insularo kaj de la bordoj de la Finna kaj Botnia golfoj. Kankroj estis aŭtuna festoplado, sed nun la majoritato de kankronmanĝantoj devas aĉeti importitajn kankrojn vendeje. Antaŭlonge finnoj manĝis multajn haringojn, rostitaj, frititaj, fumaĵitaj, salitaj, en vinagro kun spicoj. Poste oni rimarkis, ke en ili troviĝas poluaĵoj kaj estas danĝere manĝi ilin tro ofte. En norda Finnlando salmaĵoj estis ĉiutagaj. Servistoj kaj laboristoj laŭdire preferis dungiĝi ĉe bienoj, kie salmo ne tro ofte estis surtabligita. Nun oni vendas multan norvegan salmon, breditan en kaĝoj en la maro. Sovaĝa natura salmo kostas multe pli.

Pri fromaĝoj kaj laktaĵoj: ni havas multajn specojn da lakto kaj acidlakto, sen graso, sen laktozo, kun pli aŭ malpli da graso. Lujn laktojn oni reklamas per ideoj pri bovinoj en libero aŭ per la vorto "luomu", kiu signifas natura, sen aldonaj. En mia junaĝo la fromaĝoj estis trispecaj: Emmental (iel kiel gruyère), alia iom iel kiel la nederlanda Edam, kaj trie



mola fromaĝo ŝmirebla. Oni faris fromaĝojn ankaŭ hejme per la helpo de ovoj aŭ kazeigilo. Koloastro - la unua lakto de naskinta bovino, en forno fariĝis franda mola fromaĝo manĝebla per kulero kaj kun vakcinioj, sukero, cinamo. Svedlingve tiun kolostrajon oni nomas kalvdans (bovida danco!) sed finnlingvanoj pli serioze nomas ĝin uunijuusto (fornofromaĝo). Nun troveblas fromaĝoj faritaj eksterlande aŭ laŭ eksterlandaj receptoj: ŝimfromaĝo preskaŭ kiel rokforto, parmezano, mocarelo kaj aliaj nekonataj de mi. Ni multe uzas kazeon, ĝi povas esti natura, sen spicoj, aŭ kun sukero, vanilo, beroj, fruktopecoj. El kazeo oni faras en ortodoksaj regionoj pasha-deserton por pasko.



Malnovaj pladoj kiuj ne perdas sian favoron estas pizosupo, fiŝosupo, supo el bovaĵo kaj terpomoj, viandobuletoj, viandhaketaĵo, rostaĵoj, stekoj, ŝinko, pistitaj terpomoj, nigraj kolbasoj el sango. Griokolbasojn mi junaĝe faris plenigante zorgeme purigitan porkan inteston helpe de bovina korno. Nun pli junaj generacioj konas pommes frites, pizza,

spagetoj, lasagne, sushi, tapas k.a. Ŝafaĵojn oni ne facile havigas al si en Finnlando, sed ili pli oftas en Paska tempo.. Konkojn kaj mitulojn ne multaj finnoj lernis manĝi. Kokidaĵoj nun estas multe pli oftaj ol antaŭ 30-50 jaroj. Meleagrojn kelkaj finnoj aĉetas ĉefe por Julo/Kristnasko.

Iom pri desertoj: oni faris kaĉojn kaj dolĉaĵojn el beroj kaj sekigitaj fruktoj importitaj, la likvaĵo densigita per (terpoma) fekulo. Malnova deserto estis kaĉo el tritikaj grioj kaj vakcinioj kun sukero. Nun oni ofte prenas berojn kaj glaciaĵojn el frostigilo. Oni ŝatas jahurtojn: finna, greka, turka, kun beroj, sen beroj, kun/sen sukero, vanilo kaj aliaj spicoj. Kiel ĉie, ankaŭ en Finnlando oni ŝategas krespojn kaj patkukojn kun konfitaĵo, batita kremo, sukero. Ofte la dommastrino aŭ restoracio proponas kafon kiel deserton kaj eble kun tio pecon da torto aŭ ĉokoladaĵeton, biskviton.

Multaj finnoj, ankaŭ infanoj, jam suferas pro troa dikeco kaj pezo. Ni estas konsilataj malpliigi niajn manĝojn. Devus sufiĉi unu terpomo tage, nur 1½ glasoj da lakto, malofta viandaĵo kaj tio ne ruĝa. Tio por kontraŭbatali la klimatsanĝiĝon Sukeron, buteron, salon ni evitu, ni manĝu pli da laktuko, spinaco, salato, legomoj, verdaĵoj. Antaŭe viroj ŝercis, ke ili NE manĝos herbon, nun ankaŭ ili devas. Antaŭe oni diris, ke la magiaj vortoj en kuirado estas butero, kremo kaj sukero. Nun ĝuste tio fariĝis evitenda.

*\* Prezantota dum la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kiu okazos samtempe kun la 154-a UK en en Lahtio, Finnlando*

verkis kaj sendis **Raita Pyhälä** el Finnlando

## La Aviadilo

*(elĉerpita el la rakontaro "Makedonio 1900" de Neĝati Ĝumali\*)*

**M**ia patro tute ne ŝatis, ke aliuloj enmiksiĝu en siaj aferoj, do, li neniam parolis pri kio li intencis fari. Kaj al neniu li parolis pri lia intenco sendi min al liceo en Istanbul. Sed pro mia ekscitiĝo viziti Istanbulon mi iomete babiladis al kelkaj de miaj amikoj. La novaĵo rapide disvastiĝis en la urbeto.

La islamanoj de Florina (1) tute ne aprobis la decidon de mia patro. Laŭ ili, la knabinoj devus lerni ĉe la hoĝao (2) parkerigi la Koranon, kaj la knaboj devus lerni en la gimnazio, kaj ĉio ĉi sufiĉus. Pli ol tio estus domaĝo. Edukado disigas la knaboj de sia patra hejmo kaj deŝiras ilin de sia urbeto. Ĝi estis pordo de disigo. La edukita knabo poste ne plu estus utila por la

## tradukis Vasil Kadifeli el Turkujo

patra hejmo. Ili komencus salajriĝi kaj vagadi de loko al loko kaj ne ekloĝus ie ajn. La islamanoj favoris la loĝantan vivmanieron. Ili estis feliĉaj kun siaj domoj, vinberejoj, kampoj, fruktoĝardenoj, magazenoj. Ili fakte estis sataj homoj. Ne estis grava por ili, ĉu ili posedis multajn aŭ malmultajn varojn, ĉu iliaj magazenoj faris multajn aŭ malmultajn negocojn. Neniu plendis pri la malgrandeco de iliaj domoj por siaj familioj, pri la nesufiĉaj vinberejoj aŭ kampoj. Ili bredis unu bovinon aŭ unu kaprinon kaj kvin ĝis dek kokinojn, kaj plue kreskigis kelkajn prunarbojn en siaj ĝardenoj. Sufiĉis por ili la tritiko de ilia kampo, la lakto kaj ovo de iliaj bestoj, la fruktoj de iliaj arboj. «Danke al dio, ke Li montris al ni tiujn tagojn» estis la plej aŭdata eldiro el





liaj buŝoj. La metiistoj kiu laboris inter la stratoj en la najbarejo en siaj malgrandaj magazenoj estis kontentaj pro sia vivo. La tuttaga vendado de la nutraĵvendejoj konsistis el keroseno por la petrollampoj, kandeloj, alumetoj, sapo kaj dolĉaj ostitaj kikeroj. Kaj tamen ilia vizaĝo ridis. «Eĉ se ĝi ne fluas, ĝi gutas» ili diris. Ili ŝajne ne malfermis siajn magazenojn por enspezi monon sed por pasigi tempon. Ĉar, ĉu ili tion elparolis ĉu ne, ilia sinteno estis resti tie, ankriĝi en siaj lokoj kaj gvati la urbeton.

La edukitaj homoj en la urbeto estis ĉefe la grekoj kaj la guberniestro kaj la oficiroj nomumitaj el Istanbulo. La doktoroj en la urbeto estis grekoj. La apotekisto greko. La unusola advokato estis greko. La bezono pri edukiteco inter la islamanoj estis nove aperanta. La barbisto s-ro Ŝerif sendis sian filon al la liceo en Monastir (3) kaj poste al Istanbulo por fariĝi kuracisto. La gvardisto s-ro Zuhtu, sen konsiderante sian povrecon, sendis sian filon al la ŝtatlernejo pri politikaj aferoj en Istanbulo. La islamanoj de la urbeto taksis tiujn kondutojn kiel blasfemon. Laŭ ili, tiuj du viroj tute ne sciis siajn limojn. Ĉu ne sufiĉus al la filo de barbisto Ŝerif fariĝi cirkumcidisto ĝuste tiel, kiel li? Pro kio li fariĝos kuracisto? Ĉu li malsatos? La loĝantaro posedos sufiĉajn knabojn por ke ili espezu monon. Ankaŭ la konduto de gvardisto Zuhtu estis ridinda, laŭ ili. Ĉu la filo de gvardisto povus esti guberniestro, provincestro? Eĉ se li fariĝos guberniestro en Florina, ĉu la loĝantaro obeus al liaj ordonoj? «Ĉu vi ne estas la filo de gvardisto Zuhtu?» oni demandus. «Ĉu vi estas tiu, kiu montros al ni la bonon kaj malbonon?»

Kiam oni aŭdis, ke mi vojaĝus al Istanbulo, tiuj, kiuj ne kuraĝis diri ion al mia patro, komencis haltigi min surstrate. La lama s-ro Reŝit riproĉis min. «Ho ve, Mustafa, li diris, kion plu vi deziras? Vi posedas vinberejon kaj kampon ĉe Sarimeŝe. Via patro posedas magazenojn pri teksaĵoj. Por kio estu via edukiteco? Via patro elspezos monon por la veturado al Istanbulo, por la lernejo. Anstataŭe, li povus aĉeti por vi vinberejon aŭ ĝardenon, aŭ malfermi por vi magazenojn. Tiu decido estus pli saĝa!»

Mi al tio provis nur murmuri ion kiel: «Mia patro scias...» sed li parolante pli kaj pli koleriĝis:

«Ĉu vi estas tiu, kiu volas iri al Istanbulo kaj lerni pli? Aŭ ĉu estas via patro, kiu volas tion?»

Mi ne scias pro kio, sed ĉu eble pro ke mia patro ne aŭdu riproĉojn? Aŭ ĉu pro ke mi volis iomete fanfaroni? Mi murmuretis dirante: «Mi...»

«Ni ankaŭ havas knabojn. Vi fariĝos malbonaj ekzemploj al ili pere de tiu emo. Eble post iom da tempo, ili ankaŭ ekvolos iri al Istanbulo. Ne restos komforto kaj paco en niaj hejmoj!»

«Se vi foriros, se la alia foriros al kiu restos tiu urbeto de Florina? Al kiu ni liveros tiun landon? Kion vi volas atingi per tiu forlasado? Ĉu vi volas, ke niaj vinberejoj, niaj ĝardenoj restu al grekoj aŭ al bulgarioj? Ĉu vi volas, ke ili venu kaj ekloĝu kun siaj malpuraj pugoj en niaj hejmoj? Ĉu via koro ne doloras pri tio? Ĉu via cerbo ne funkcias?»

Same al lama s-ro Reŝit, kelkaj aliaj ankaŭ haltigis kaj riproĉis min dum tiuj tagoj. Sed miaj amikoj enviis pri mia iro al Istanbulo, kaj elparolis siajn pensojn, siajn revojn, siajn sopirojn pere de diroj: «vi vidis la sultanon», «vi vagados en Bejoglu» (4). Sed en la fino la decido de mia patro ne ŝanĝiĝis. Li sendis min al Istanbulo.

Estis du jaroj poste. En 1912 dum la someraj ferioj kiam post la vendreda tagmeza preĝo, la lama s-ro Reŝid kaj liaj amikoj, ĉirkaŭis min kaj komencis pridemandi pri kio okazas en Istanbulo, kion mi vidis tie, kion mi lernis ktp. Mi volis rakonti al ili ĉiun aspekton de Istanbulo, kiun ili ŝatus. Mi parolis pri moskeoj, pri la vendreda preĝo de la sultano, pri la ponto de Galata (5). Sed al ĉiu de tiuj temoj ili tuj demandis «Kio alia?» «Kion alian vi volas? mi diris. Mi estas lernanto...». La lama s-ro Reŝid komencis denove koleri: «Vi ja vidis ion, vi vidis ion alian...»

Mi ruĝiĝis:

«Kion mi vidis?»

«Rakontu pri tio! Kial vi ne rakontas pri ĝi? En la stratoj vi rakontas al ĉiuj viaj amikoj. Kial vi ne diras ion al ni?»

Mi komprenis pri kio ĝi temis. Sed, ĉar mi ne sciis kio povus okazi post tiu konduto, mi pretendis, ke mi ne komprenis.

«Ĉu ĝi flugas en la aero? Ĉu ĝi estas bruega? Rakontu al ni, kiu estas tiu mensogo?»

Pri la aviadilo li temis. Mi vidis aviadilon. La plej grava afero de tiu jaro estis la aviadilo por mi. Proksime al la ferioj, iun tagon, kun nia lernejo ni vizitis Yesilköy urbeton (6), kaj la spektaklon de aviadilisto s-ro Fethi. Ni vidis s-ron Fethi apud sia aviadilo. Ni vidis kiel li flugis kun sia du-flugila unu maŝina aviadilo. Kiel li kuŝigis la aviadilon flanken, kiel vi enplonĝis vertikale al la tero, kaj poste kiel li surgrimpis supren al la aero kaj en tiu momento ni restis senspiraj. Pli poste ni ĉirkaŭis s-ron Fethi. Ni rigardis al li kiel fabela heroo kiu alvenis el la ĉielo. Dum tri monatoj mi pensis daŭre pri tiu neforgesebla spektaklo. La aviadilo kaj la kuraĝo de s-ro Fethi estis la fonto de mia admiro. Mi tiun daŭre rakontis al miaj amikoj ekde mia reveno al Florina. Kaj mia entuziasmo reviviĝis eĉ per tia malplaĉa malfermo de la temo.

«Aviadilo!» mi diris.

«Kio estas tio?»

Mi ne sciis de kie mi komencu rakonti al ili tiun gravan okazaĵon.

«Kiel birdo. Ĝi flugas.. Du flugila...»

S-ro Reŝit kaj liaj amikoj rigardis al mia vizaĝo kun pli kaj pli malplaĉa sinteno.

«Diru ke... ĝi estas ia... fluganta aŭtomobilo...»

Komencis la murmurado:

«Ĉu fluganta aŭtomobilo?»

«Kiel ĝi povas flugi?»

«Kiel povas okazi tia afero?»

«En la fronto estas heliko. En ĝia malantaŭo estas ĝia vosto. Ĝia korpo estas kiel birdo. En la brusto ĝi estas larĝa, kaj ĝi malplilarĝiĝas malantaŭen...»

Anstataŭ la piedoj de la birdo ĝi havas radojn...»

Por montri al ili la flugilojn de la aviadilo mi etendis la manojn kaj mi daŭris la rakontadon. Sed mi aŭdis pli da murmuroj:

«Ĉu li parolas al ni ĝuste? Ĉu li inventas mensogojn? Ĉu li trompas nin?»

«Ĉu vi kredas je tio? Ĉu povas okazi tia afero?»

Estis evidente ke ili malŝatis tion, kion mi rakontis al ili. Preskaŭ je la fino de mia rakonto, ili ne plu povis elteni sin:

«Eble la lernejo alportis vin al ĵonglisto, ĉu ne?»

«Ĉu via patro sendis vin al Istanbulo por tiaj aferoj?»

Ĉu por ke vi revenu kaj rakontu al ni viajn revojn?»

Komencis diskutado inter ili:

«Ĉu homo povas flugi?»

«En la Korano ne estas mencio pri tio?»

«Se homo povus flugi, tion certe la Korano menciis?»

«Li plej eble konfuziĝis la ĉefanĝelon Gabrielo, Dia saluto estu sur li, kun tiu s-ro Fethi...»

«Ĉio, kio troviĝas en la estonteco de la homo estas menciita en la Korano. Nia s-ro Profeto jam malkovris ĉion, kio okazis kaj okazos, ekde la fondo de la mondo ĝis la apokalipso, al siaj servantoj. Nia Hafiz (7) Ibrahim jam dirus tion al ni, li ne atendus, ke tiu knabo iri al Istanbulo kaj reveni por malkovri tion al ni.»

S-ro Reŝit denove malsuprenigis forte sian bastonon kvazaŭ trapikante la grundon.

«Pento, pentu! Ĉu vi ne estas filo de islamano, ĉu mi ne sciis kiu vi estas, mi pensus ke vi estas nekredanto. Via avo, antaŭ tridek jaroj, pilgrimis. Nur post tri monatoj li sukcesis reveni hejmen. Neniu havis la ŝancon atingi tian rekompencan. Same al nia Hafiz Ibrahim, vi estas filo de islamano kiu permane skribis kaj reproduktis tiom da Koranoj. Ĉu taŭgas al via buŝo tiuj mensogoj? Mi ne aŭdu, ke vi tiom grande pekos denove...»

Ili, unu post la alia, riproĉante min foriris el mia ĉirkaŭo. Sen rigardante al mia vizaĝo ili disiĝis.

Sed en tiuj tago, en la gazetoj estis tiom da artikoloj pri aviadiloj. Tamen ili neniun gazeton prenis enmane. Italoj jam uzis aviadilojn en la milito de Tripolo (8) ĵus dek monatoj antaŭe.

Pasis tri monatoj kaj komencis la milito en Balkanoj. Novembre du grekaj aviadiloj aperis supren de Florina. Ili bombis la fervojojn kaj forflugis. La eksplodoj aŭdiĝis en la urbeto.

Komencis kurado tien kaj reen en la islama najbarejo. Homoj alfrontis la aferon per diroj kiel: «Venis la fino de la mondo. Signo de apokalipso. Tiuj nekredemuloj enmiksiĝas en diaj aferoj...». Neniu inter ili diris ke tio, kion mi rakontis al ili estis vero. Ĉiuj, tiuj maljunaj islamanoj, finis siajn vivojn kredante, ke Dio kreis homon por iradi sur la grundo, kaj tiuj, kiuj interesiĝis al flugado tiel, kiel la anĝeloj en la ĉielo, tiuj, kiuj malhelpis la pacon de la ĉielo, iam estos punataj.

**(1) Florina** – urbo en norda Grekujo apud la bordo de Norda Macedonujo. (2) *hoĝao* – aŭ imamo, teologo kaj kultoficanto de moskeo.

**(3) Monastir** – urbo nuntempe en Norda Macedonujo, kies nuntempa nomo estas Bitola.

**(4) Bejoglu** – Distrikto kaj la ĉefa strato de tiu distrikto en Istanbulo, pli okcidenteca, kie troviĝis kinejoj, teatrejoj, restoracioj, kaj amuzejoj.

**(5) ponto de Galata** – Galata estas distrikto apud la Ora Korno en Istanbulo sur kiu troviĝas ponto kun la sama nomo.

**(6) Yesilkoj** – distrikto de Istanbulo kie oni konstruis la unuan flughavenon.

**(7) Hafiz** – estas tiu, kiu parkerigis la Koranon, ĝi ankaŭ estas homo kiu kantas preĝojn

**(8) Tripolo** – urbo en Libio en norda Afriko kie okazis bataloj dum la Unua Mond Milito.

\* **Necati Cumali (1921-2001)** estis turka verkisto de noveloj, mallongaj rakontoj, eseoj, kaj poemoj. Li naskiĝis ĉe albana familio en Florina, nuntempa Grekujo. Lia familio poste ekloĝis en Urla, İzmir laŭ la popolaŝanĝo interkonsento inter Turkujo kaj Grekujo (1923)

Tradukis **Vasil Kadifeli**, el Turkujo

Unue aperis en "Buletini" BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO – INSTITUTO - #143 - majo junio

**P**er sia apero en sennombraj sciencfikciaj filmoj kaj libroj, nigraj truoj certe pruvis ke ili estas inter la plej interesaj objektoj en la universo. La ideo de nigra truo estas mistera. Temas pri objekto kun tiom granda denseco, ke ĝi rompas la nunan komprenon de fiziko kaj neniu scias kio okazas preter ĝia rando. Ĝi instigas la homan fantazion al elpensi la plej frenezajn historiojn, ĉar se neniu vere komprenas la objekton, ĉio subite eblas.

En la nefikcia universo, nigraj truoj komenciĝis kiel matematika koncepto. Ili sekvis el la matematiko, kiun Einstein, kaj poste ankaŭ aliaj fizikistoj, malkovris. Masoj povas iĝi senfine densaj kaj kuniĝi en unu senfine malgranda punkto. Unue tio sonis tute neebla. Devis esti iu nemalkovrita meĥanismo de la naturo, kiu preventus la formiĝon de tia punkto. Observoj montris la malon tamen. Estas steloj, ekzemple, kiuj rapide moviĝas ĉirkaŭ nevidebla, centra punkto. Ilia ekzakta orbito indikas ke ili iras ĉirkaŭ objekto kun tre granda maso. Nigraj truoj do estis observeblaj, sed nur rekte per observi la stelojn ĉirkaŭ ili. Hodiaŭ oni kredas ke nigraj truoj estas sufiĉe abundaj objektoj kaj ke la plejparto de galaksio havas gigantan nigran truon en la centro.


### Kio estas nigra truo?

Nigra truo estas objekto kun tiom forta gravita kampo, ke eĉ lumo ne povas eskapi ĝin. Tio ne signifas ke la maso de nigra truo nepre estu giganta. Ajna maso povas iĝi nigra truo, se oni sufiĉe forte kunpremas ĝin, do la denseco de la objekto pli gravas ol la maso. Ekzistas simpla formulo, kiun oni povas uzi por kalkuli kiom malgranda objekto devas iĝi por esti konsiderata nigra truo. La formulo funkcias por Schwarzschild nigraj truoj, kio signifas ke la nigra truo ne havu elektran ŝarĝon aŭ angulan movokvanton. Veraj nigraj truoj ĝenerale havas angulan movokvanton (ili rotacias), sed la formulo por Schwarzschild nigra truo estas daŭre bona indiko kaj facile komprenebla.

$$r_s = \frac{2Gm}{c^2}$$

En tiu ĉi formulo,  $r_s$  estas la radiuso de Schwarzschild en metroj. Ĝi estas la radiuso de la eventa horizonto: surfaco de sfero, ene de kiu lumo ne povas eskapi. Kiam oni parolas pri la grandeco de nigra truo, oni ne parolas pri la objekto mem, ĉar nigra truo estas senfine malgranda, sed pri la grandeco de

tiu sfero. m estas la maso de la objekto en kilogramoj. Ju pli granda la maso de la objekto estas, des pli granda la radiuso de Schwarzschild estas. Finfine estas du konstantaj nombroj, kiuj estas la rezulto de la fundamentaj kvalitoj de la universo. Ili estas G, la gravita konstanto, kaj c, la rapido de lumo. Se oni kolektas ĉiujn necesajn nombrojn, oni povas kalkuli la radiuson de Schwarzschild por ajna objekto. La schwarzschildradiuso de la Suno ekzemple, estas iom pli eta ol 3km kaj tiu de la Tero estas ĉirkaŭ 9mm. Teorie oni do povus fari nigran truon el la Suno kaj Tero, sed praktike ili ne havas sufiĉe da maso por la meĥanismoj, kiuj kreas nigrajn truojn.



Tre baza strukturo de nigra truo. La singulareco (singularity) estas la senfine densa punkto.

### Formiĝo de nigraj truoj

Nigraj truoj povas kreiĝi per pluraj meĥanismoj kiel la kunfandiĝo de pli etaj nigraj truoj, aŭ kiel produkto de la praeksplodo, sed la plej konata meĥanismo estas parto de la evoluo de steloj. Dum ilia vivo, steloj ŝanĝiĝas surbaze de la "brulaĵoj", kiujn ili havas kaj do de ili maso. La grandeco de stelo estas regata de balanco. Unuflanke la gravito de la stelo provas kunpremi ĝin, sed ĝi ankaŭ produktas multe da energio, kiu kaŭzas kontraŭpremon. Tiu energio venas de nukleaj reagoj en la kerno de la stelo. Elementoj kun malalta maso, kiel hidrogeno, estas kunfandigataj, kreante elementojn kun pli alta maso, kiel heliumon. Tiu procezo nomiĝas nuklea fuzio. La elementoj iĝas pli kaj pli pezaj ĝis la stelo produktas feron, post kio la

kunfandigo ne plu nete liberigas energion. Je tiu momento, la kerno devas serĉi novan balancon.

Je la fino de sia vivo, la Suno iĝos blanka nano. Tio estas stelo, kiu ne plu povas subteni sian ekvilibron per la varmo de nuklea fuzio, sed la principo de ekskludo preventas ke ĝi kunpremiĝu eĉ pli. Laŭ tiu kvantummeĥanika principo, du elektronoj ne povas okupi la saman kvantumstaton, kio preventas ilin de kunpremiĝi tro multe. En pli grandaj steloj, eĉ tiu premo povas esti venkita, kio kreas neŭtronan stelon. Tio estas stelo en kiu ĉiuj elektronoj kaj protonoj kunfandiĝis, kreante neŭtronojn. Ankaŭ neŭtronoj ne volas kunfandiĝi pro la principo de ekskludo, kio preventas neŭtronajn stelojn de kunpremiĝi eĉ pli. La denseco de neŭtrona stelo estas nekredible granda, pro tio ke 99% de atomo kutime estas malplena spaco. En neŭtrona stelo, tiu malplena spaco malaperis, kio igas la stelon tiom densa kiel giganta atomkerno. La rezulto estas stelo kun radiuso de kelkaj kilometro kaj maso pli granda ol tiu de la Suno. En la plej grandaj steloj eĉ la neŭtronoj kunfandiĝas kaj neniu forto en la universo sufiĉe grandas por kontraŭi la kunpremiĝon. La stelo malkreskadas ĝis ĝi iĝas senfine malgranda. Alivorte, ĝi iĝis nigra truon.


### Foti nigran truon

Antaŭ nelonge, la unua bildo de nigra truon publikigis kaj iĝis novaĵego ĉie en la mondo. Ĝi estis la rezulto de granda internacia kunlaboro kun astronomoj kaj teleskopoj el multaj landoj sub la nomo "Event Horizon Telescope" (Eventhorizonta Teleskopo). La matematiko, kiu priskribas nigran truon, jam ekzistas dum jarcento, kio igas onin demandi sin, kial neniu vidis nigran truon ĝis ĉi-jare. Komprenable la respondo temas pri kiom malfacile foti nigran truon povas esti.

La EHT havis observis la supermasan nigran truon en la centro de la galaksio Messier 87 (M87). Tiu elekto ŝajnas iom stranga, pro tio ke la Lakta Vojo havas propran supermasan nigran truon, sed oni ne elektis M87 tute hazarde. La nigra truon en la centro de la Lakta Vojo, Sagittarius A\*, havas mason ĉirkaŭ 4 milionojn da fojoj pli grandan ol tiu de la Suno. Tio estas nekredible multe, sed nenio kompare al la maso de la nigra truon en M87 de pluraj miliardoj da Sunoj. Tio signifas ke la Schwarzschildradiuso de la nigra truon en M87 estas pli ol 120AU (astronomiaj unuoj: 1AU estas la distanco inter la Suno kaj la Tero). La Schwarzschildradiuso de Sagittarius A\* eĉ ne atingas 1AU. Kvankam la fotita nigra truon estas tre granda, ĝi daŭre estas tiom for, ke ĝia grandeco en la ĉielo estas nur 19-38 $\mu$ s. Por kompreni tiun nombron, oni sciu ke oni mezuras objektojn en la ĉielo per

gradoj. La diametro de la Luno estas ĉirkaŭ duona grado. Pli etaj objektojn oni mezuras per angulaj minutoj, kiuj estas sesdekonoj de grado kaj angulaj sekundoj, kiuj estas sesdekonoj de angulaj minutoj. La grandeco de la nigra truon estas mezurata en angulaj mikrosekundoj, aŭ miliononoj de angulaj sekundoj. Tia grandeco estas komparebla al la punkto sur la "i" en la dokumentoj, kiujn la Apollo misio lasis sur la Luno, vidite de la Tero.

Neniu sola teleskopo surtere kapablas foti objektojn, kiuj aspektas tiom etaj en la ĉielo kiel la nigra truon en M87. Por foti tian objekton, oni bezonus teleskopon, kiu tiom grandas kiel la tero mem. Tio komprenable ne eblas, sed astronomoj havas bonan kromvojon por tamen krei tian teleskopon. Kiam oni observas la saman objekton per du teleskopoj kaj kombinas ilin, oni pensus ke la distingpovo duobliĝus, sed eĉ pli bonas. Kiam oni kombinas du teleskopojn, ili agas kiel teleskopo tiom granda kiel la distanco inter ili. Se oni do metas unu teleskopon en Madrido kaj unu en Moskvo, oni havas la distingpovon de teleskopo tiom granda kiel Eŭropo. La EHT do ne estas unu teleskopo. Ĝi estas reto de grandaj profesiaj observatorioj ĉie sur la mondo, eĉ sur Antarkto. Interesa fakto estas ke la kvanto de datumoj, kiuj devis esti kolektataj estis tiom granda, ke oni ne povis uzi dratojn aŭ la interreton por sendi ilin. Anstataŭe oni uzis aviadilojn, kiuj fizike transportis la durdiskojn. Reto de teleskopoj do estas tre utila kiam oni volas distingi tre forajn, etajn objektojn, sed ĝi ankaŭ havas problemon. La EHT havas la distingpovon de teleskopo tiom granda kiel la tero, sed ĝi ne kolektas same multe da lumo. Por solvi tiun problemon, oni bezonis rigardi la nigran truon tre longe kaj kombini la lumon kolektitan dum tiu longa tempo. Lui teleskopojn kaj pagi astronomojn estas multekosta tamen, do la observtempo devis esti kiel eble plej mallonga. Ankaŭ tiu faktoro kontribuis al la elekto de M87, ĉar la supermasa nigra truon en tiu galaksio estas multe pli aktiva ol tiu en la Lakta Vojo. Kiam la datumoj estis elektitaj, homoj kaj komputiloj kunlaboris por krei bildon el ili. Ili faris tion en





malsamaj teamoj, kiuj ne rajtis komuniki, por vidi ĉu ili venus kun la sama rezulto. La rezulto de tiu grava laboro estas la unua bildo de nigra truoj, kiu videblas ĉi-sube.

### Kiel interpreti la bildon

Nigraj truoj absorbas ĉiun lumon. Tial ili estas nigraj. Kion oni do vidas sur la bildo? Por pli bone kompreni tion, oni devas kompreni kiel nigra truoj estas strukturita kaj kion ĝi faras al siaj ĉirkaŭaĵoj. La plej grava parto estis la eventa horizonto. Ĝi absorbas ĉiun lumon kaj do aspektas kiel ombro. Tio klarigas kial la mezo de la bildo estas tute nigra. La ombro estas multe pli granda ol oni atendus, parenteze. Pro tio ke nigraj truoj kurbigas la spacon ĉirkaŭ si, ankaŭ lumoj kiu preterirus la nigran truon povas esti ensuĉata. La bela parto de la bildo ne estas la eventa horizonto tamen. Ĉirkaŭ aktiva nigra truoj rondiras disko de materialo, per kiu la nigra truoj nutras sin. Tiu materialo nomiĝas la alkreska disko. La disko iras tre rapide kaj povas alproksimiĝi al la rapido de lumoj. La ekstremaj kondiĉoj igas la diskon milionojn da gradoj varma, kio igas ĝin brile elsendi radion. La oranĝkolora (la koloroj en la bildo estas malveraj) svaga cirklo sur la bildo estas tiu alkreska disko. Iom aspektas kvazaŭ la foto estas farita de supre, pro tio ke oni vidas la tutan diskon. Ĉe Saturno ekzemple, parto de la disko ne videblas, ĉar ĝi estas malantaŭ la planedo. Kiam temas pri nigra truoj tamen, tio estas

iluzio. Oni ĉiam vidas la tutan diskon, sendepende de la angulo. Por kompreni tion, oni komprenu ke la cerbo pensas ke lumoj ĉiam iras rekte, eĉ se ĝi iras tra kurbita spaco. Kiam parto de la disko estas malantaŭ la nigra truoj, la forta gravita kampo tiel kurbigas la lumon, kiun la disko elsendas, ke ĝi tamen atingas la Teron. La lasta efiko, kiu videblas, estas ke parto de la disko aperas multe pli brila ol alia parto. Tio estas la rezulto de Dopplerradiado. Tio kaŭzas ke la parto de la disko, kiu moviĝas en nian direkton aspektas pli hela ol la parto kiu moviĝas for de ni.

Kvankam la unua vera bildo de nigra truoj ne estas tiom spektakla kiel en sciencfikcio, ĝi estas ege grava. Ĝi ne nur estas simbolo de bela, internacia kunlaboro, sed ankaŭ pravas ke la ideoj, kiujn sciencistoj havis pri nigraj truoj estas ĝustaj. La spertoj kaj konoj, kiujn astronomoj akiris per tiu ĉi projekto certe helpas ilin eĉ pli bone kompreni la universon de kiu ni ĉiuj estas parto kaj ĉi tio sendube ne estos la lasta nigra truoj, kiun homaro fotis.

Vidu ankaŭ la artikolon de ISAE pri la foto:

<https://www.sciencia-asocio.com/single-post/2019/04/15/Unuafoje-oni-fotis-nigran-truon>

verkis **Frank van Hertrooij** el Nederlando

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2019/04/17/kio-estas-nigra-truoj/>

## Ni komencu ĉie instrui

Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kiu havas sian sidejon en Hago, Urbo de Paco, estis oficiale fondita en Nederlando de Julia Isbrücker kaj de la hungardevena pastro Andreo Cseh la 24-an de majo 1930. La ĉefa celo de tiu fondaĵo estis grandskala organizado de Ĉe-kursoj kaj la edukado



## -- IEI - Internacia Esperanto Instituto

de Ĉe-instruistoj, kiuj uzante Ĉemetodon disvastigu Esperanton. La metodo, iniciatita de Andreo Cseh kaj nomita laŭ lia familia nomo, estas rekta instru-metodo. Ĝia esenco estas lernigi vortojn, komprenigi la nociojn kaj gramatikaĵojn al kursanoj sen uzo de nacia lingvo kaj sen uzo de lernolibroj.



La fondaĵo de IEI estis mejloŝtona okazaĵo en la Esperanto-historio. Pastro Cseh estis tre ĥarisma kaj inspira, li sukcesis ekkirli la trankvilan verdan mondeton per siaj instruaj lecionoj. Liaj lecionoj kaj seminarioj dum diversaj Esperanto-renkontiĝoj allogadis multajn aŭskultantojn. Dum diversaj aranĝoj en la tuta Eŭropo dum la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento li edukis amasojn da samideanoj.

Ne mankis tamen kontraŭstaroj kaj kritiko pri lia agado kaj pri lia fondaĵo. La tiama vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Anton Vogt, skribis en Heroldo de Esperanto de la 18-a de julio 1930: "... Per ekspres-kursoj de 8-10 tagoj oni atingas nur la disvastiĝon de malbona diletantismo, kiu miskreditigas

la tutan sistemon... La maniero laŭ kiu la nova instituto estas fondita, kaŝas en si la danĝeron, ke morgaŭ ekestos iu ajn alia instituto sen ia legitimigo de nia rajtigita centro \*...” Tiu ĉi kritiko elvokis ĉie protestojn. Malgraŭ ĉio pastro Andreo Cseh daŭre senlace laboris internacie por la movado kaj kontribuis al la renesanca periodo de Esperanto en Eŭropo.

IEI bezonis stabon de modelaj Ĉe-instruistoj kaj Andreo Cseh entiris en la laborojn de la instituto sian kapablan kaj temperamentan amikon Julio Baghy. Li, kiel verkisto, kunkreis kaj evoluigis la materialon por la lecionoj, riĉigante la kursan enhavon. Verŝajne la plej sukcesa didaktika ilo en la libro-historio de Esperanto estas Konversacia Literaturo, serio de ok kursaj libretoj faritaj kune de Andreo Cseh kaj Julio Baghy.

La Ĉe-metodo povas servi kiel bazo por la entuziasmigo de homoj pri Esperanto kaj rapida disvastigo de la internacia lingvo. Por aranĝi grandskalan instruadon de Esperanto oni devas instigi la homojn, kiel povis fari Andreo Cseh kaj tiuj sekvantoj, kiuj instruis laŭ lia metodo.

La fondaĵo Internacia Esperanto- Instituto daŭrigas la laboron de Andreo Cseh diskonigante Esperanton kiel internacian komunikilon.

IEI klopodas atingi ĉi tiun celon per diversaj aktivajtoj: edukado de Esperanto-instruistoj, gvidado

de Esperanto-kursoj, organizado de konversaciaj kunvenoj, preparado, eldonado kaj disponigado de Esperanto-instrumaterialoj, kolektado kaj disponigado de libroj kaj gazetoj en Esperanto aŭ koncernantaj Esperanton.

Interalie pro tio, ke nuntempe Esperanto estas pli ofte studata aŭtoddidakte aŭ pere de interretaj kursoj, la agado de IEI prioritare limiĝas al la okazigo de kunvenoj, dum kiuj Esperanto povas esti praktike uzata.

La Esperanto-kunvenoj rilate Esperanton kaj la E-kulturon okazadas en la Haga Andreo Cseh-Domo, kiel ekde 2007 estas nomata la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto.

Pli da detalaj informoj pri la fondaĵo Internacia Esperanto-Instituto oni povas trovi sur ĝia retpaĝo: [www.iei.nl](http://www.iei.nl)

\* Internacia Centra Komitato, la supera institucio de Esperantujo, kun la sidejo en Ĝenevo, antaŭulo de UEA.

Fonto : **Esperanto revuo** 1280 (5) majo 2014

verkis **Jolanta van Holstein** el Nederlando

## -- el ipi - informilo por interlingvistoj

### **Kurso en Esperanto por universitaj instruistoj okazos en Krakovo**

Kadre de **Cracow Language Teaching Staff Training Week**, okazos intensiva E-kurso por universitataj instruistoj de lingvoj el diversaj landoj, neesperantistoj, kiuj partoprenas Erasmus +, Staff Mobility for training. La 20-hora kurso okazos de la 8-a ĝis la 12-a de julio 2019, ĉiutage. La organizanto estas la Jagelona Universitato (lingva centro). La titolo de la kurso estas: "Enkonduko al la esperantaj lingvo kaj kulturo" (Introduction to Esperanto Language and Culture). La kurson prilaboros kaj gvidos Maria Majerczak.

### **Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj kiuj konas Esperanton**

La komisiono pri agado en universitatoj de ILEI starigis la liston, kiun vi povas vidi en

<https://uea.org/vikio/>

### **Listo\_de\_universitataj\_instruistoj\_kaj\_esploristoj,\_kiuj\_konas\_Esperanton**

Tre verŝajne la listo ne estas kompleta. Se vi scias pri aliaj homoj, kiuj devus esti en la listo, bonvolu sendi informojn pri ili al la adreso

[<esperanto.en.universitatoj@gmail.com>](mailto:esperanto.en.universitatoj@gmail.com). Ni ankaŭ volonte ricevus

informojn pri kursoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko en universitato, kiuj ne estas listigitaj ĉi tie:

[https://uea.org/vikio/Agadpunkto\\_1-a:\\_universitataj\\_kursoj\\_pri\\_Esperanto\\_a\\_%C5%AD\\_interlingvistiko](https://uea.org/vikio/Agadpunkto_1-a:_universitataj_kursoj_pri_Esperanto_a_%C5%AD_interlingvistiko)

-----

### **Alilandaj esperantistaj instruistoj serĉataj por ĉina universitato**

Universitato Zaozhuang estas grava loko por la Esperanto movado. Tie troviĝas Esperanto-Muzeo kaj Esperanto-fako kun kvarjara studo. Nun la universitato planas varbi iujn fremdlandajn esperantistajn instruistojn. Kandidatoj posedu doktoran diplomon, prefere scipopvu la ĉinan, kaj prefere venu el angleparolanta lando. Interesantoj kontaktu kun mi!

-- Semio, dumviva membro de UEA kaj respondeculo de la muzeo. [semio@163.com](mailto:semio@163.com)

Fonto: **ipi - informilo por interlingvistoj**, n-ro 108 (3/2019)

Ĉu tiel alte taksas sian katon, ke li ne povas decidiĝi nomi ĝin Kato. Li donas al ĝi la nomon Ĉielo. Lia najbaro demandas lin pri la kialo.

- Mia kato estas eksterordinara, - eksplikas la strangulo. Mi konsideras ĝin supera al ĉio, egala al Ĉielo.

- Vi forgesas la nubon, kiu povas kovri la ĉielon, - sugestas la alia.

- Dankon! Pri tio mi ja ne pensis. Do mi nomos ĝin Nubo.

- Gardu vin! La plej malforta ventoblovo forbalaas la nubon.

- Nu! Vento estos de nun ĝia nova nomo.

- Sed, simpla muro povus facile haltigi la venton.

- Konsentite! Mi nomos ĝin Muro.

- Mi rimarkigas al vi, ke la plej eta muso kapablas

fosi truojn en la muroj.

- Ja vere! Ĝi prenu do la nomon Muso! Sed, estus ĉagrene, se la kato nomiĝus muso.

- Ne grave! Sed iu ajn kato povus per unu gluto formanĝi vian muson.

- Kara amiko mia, vi savas min. De nun, mi tute simple nomas mian katon Kato.

- Kaj vi prave faros. Kato neniam estos alia, ol kato, - konkludas la najbaro ridante.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/kato-estas-kato/>

**Vortareto**

- balai** - forŝovi (polvon, malpuraĵon ktp) per speciala ilo, konsistanta el fasko da vergetoj aŭ haregoj.
- eksterordinara** - forte diferenca de la normala grado aŭ kvalito.
- forbalai** - forigi, balaante.
- fosi** - turni per speciala ilo la teron de kultivota terpeco.
- gluto** - malsuprenigi ion tra la gorĝo en la ezofagon kaj stomakon.
- najbaro** - homo, tribo, popolo lo anta apude.
- nubo** - amaso da densaj akvovaporoj, pendanta en la supra atmosfero kaj kaŝanta la ĉielon.
- truo** - kaverno kun mallarĝa enirejo, kie loĝas besto.

**Muzikanto sendis Elena Popova el Bulgarujo**

Ĉu ludas por li l'steloj nokte per violoj, aŭ kantas la anĝeloj en la ĉielo vole?



Ĉu marondoj tamburas, muzikas laŭvere, aŭ per flutoj susuras por li la riveroj?

Kun birdoj kaj vento ĉu li ŝvebas libere, kie ĉiu momente sonas la ĉielsferoj?

La talent' eksentas kaj pianas sincere.

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgarujo

*Solvo de la krucvortenigmo*

J	E	S	U	O		O	N	D	O	J
O		I		M	O	N	O		T	E
I	N	K	O	G	N	I	T	O	N	
S	T	A	N	I	O	L	O		A	O
I		P	O	N	D	I		A	K	K
M	A	L	B	E	L	F	O	R	M	A
	L	E	R	T	E		N	E	A	S
I	I		A	R	A	N	E	A		M
F	L	A	K	O	N	O	J	N		R
I			O	V	R	I		E	N	O
L	O	N	I	C	E	R	O		O	D
P	R	O	D	U	T	O		N	L	
A	M		A	R	I	N	A	J	O	J
A		A	R	K	I	M	E	D	A	





**Kelkaj proverboj**

Pensoj iras trans limo sen pago kaj sen timo.  
 Laboro homon nutras, sen laboro li putras.  
 Ne venas honoro sen laboro.  
 Facile estas danci, se la feliĉo kantas.  
 Amo faras ion, mono ĉion.  
 Pli bone erari, ol nenion fari.  
 Ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas.  
 Ne uzu martelon por rompi ovoŝelon.  
 Restu tajloro ĉe via laboro.  
 Sperta mano ne restas sen pano.  
 Por malsanulo forto, por kokido la morto.  
 Vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas.  
 Lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn.  
 Post vetero malbela, lumas suno plej hela.  
 Kiu multe babilas, al si mem malutilas.  
 Vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu.  
 Unua bakas, lavas, flikas, dua sidas kaj kritikigas.  
 Morto ne distingigas, ĉiujn egale atingas.  
 Kie estas volo, tie estas vojo.  
 En la tago de la sankta Neniamo.  
 Por ĉiu plezuro devas esti mezuro.  
 Kiam kato promenas, la musoj festenas.  
 Matenas, vesperas kaj tago malaperas.  
 Se gut' al gut' aliĝas, maro fariĝas.  
 Pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj.  
 Mankas klapo en lia kapo.  
 Kiu mem sin adoras, nenion valoras.  
 Kiu ripetas abunde, lernas plej profunde.  
 Du militas, tria profitas.  
 Amo sen pano estas malbona plano.  
 Kiu havas abelojn, havas mielon.  
 Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.  
 Plej efika prediko estas praktiko.  
 Venis fino al mia latino.

**Blanka bukedo**

**Miroslav Florián**

La Frosto, maljuna ĝardenisto  
 surprizis min matene per malvarma bukedo  
 likopodiojn kaj filikojn li kunligis  
 sur fenestron en nehejtita ĉambreto  
 De kie venas praepokaj floroj?  
 De kiuj fremdaj kampetoj?  
 Milojn da strangaj glaciaj punktoj  
 tuj detruas la homspiroj  
 Eble estas la floroj neniam viditaj  
 kiuj volis kreski kaj atendi maturon  
 aŭ kisoj malpermesitaj kaj silentaj konfesoj...

**Lunetulo**

*Tiun ĉi lernis al mi mia panjo, aŭtoro estas  
 por mi nekonata, mi nur tradukis al  
 Esperanto*



**JoDo**

Post diboĉa nokto revenas Lunulo al hejm'  
 Matena Stelo bela, sur krepuska nubeto,  
 vane lin invitas en:  
 „Jen, Luneto, junuleto, ne hastu tiel al hejm'!  
 Trinku kun mi la glaseton, alvenu al mi, ĉi tien!“  
 Luneto skuis, turnis palan vizaĝon de ŝi:  
 „Ne, mi ne emas, amatino, hodiaŭ lasu min iri hejmen.  
 La nokton mi pasis ĉe Akvulaĉo en lia malpura  
 gastejaĉo.  
 Diablo prenu ĉiujn for!  
 La falsajn kartojn portis kanajlo Jupiter.  
 Judulo Merkur kaj ruĝa soldato Mars  
 okuleton kun mi ludis  
 kaj dio scias, ili ne malpliriĉiĝis!  
 Kantis al ni kun harpo kaduka Kometino  
 ĉeestis Fajra Paŝo, malbenita avulino.  
 Kaj ĉiu nokta ĉielvaganto venis kaj je mia arĝento  
 ebriiĝis...  
 O ve, o ve, mian arĝenton mi disjetis venten  
 Adiaŭ, doloras la kapo, proksimiĝas la tago.  
 Atendas min edzino Ter', ŝi ĉagrenas, koleras, krias,  
 tondras...  
 kun vipo ŝi atendas...  
 Adiaŭ, la kapo doloras, jam proksimiĝas la lum', sur  
 Lakta Vojo mi stumblas  
 lace sen humur'.  
 Sed li ne iris hejmen, direktis al vilaĝ' Skokovy  
 kaj tie sur verda musko trapasis tempon ĝis krepusko.

**Kvar ventoj**

**Ivan S. Naoumov**

Staris domo en ĝardeno pruna  
 loĝis ĝin feliĉa familio  
 panjo svelta kun rideto suna  
 patro forta kaj la filoj trio

Viroj vivas ja por laboro vira  
 navas kaj bravas fiŝkaptista gent'  
 kun la dua filo ŝipon ŝtelis  
 ŝira orienta vent'

Estis forĝisto plej aĝa el tri filoj  
 la dua balenojn ĉasadis en mar'  
 dank' al tria turnadis muelpetaloj  
 sub la ventoj kvar

Tria filo, saĝa kaj kreema  
 al ĉefurbo migris por sinprovoj...  
 rean vojon per peniko prema  
 forbalailis nordo-ventaj blovoj

Sed el sudo vente venis ardo  
 sangodora, fera, pormilita  
 iris for kun glav' kaj halebardo nova  
 fil' unua por esti murdita

Staras domo en ĝardeno senmova  
 regas la domon atendo kaj lament'  
 kaj demando: kion fari kontraŭ vent'  
 de la okcident'?